revuo

esperanto

julio 1965
58-a jaro
n-ro 716 (7)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

KIAL STUDI LA ANTIKVAJN LINGVOJN?

ESPERANTO

revuo internacia

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la **revuo** Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.· (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa marĝeno.

Bankisto de U.E.A.:
R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1965): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 81 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge, Mass. 02138, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado
77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7. 8057 Zürich, Svislando.

enhavo

121 Ĉu plu instrui la antikvajn lingvojn ?

122 Ĉu la studo de Esperanto povas anstataŭi la studon de antikvaj lingvoj ? (diskuto)

125 Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado

126 Kelkaj aspektoj de la japana lingvo (Kawasaki)

127 Kie legi la prelegojn de la I.S.U.

128 Tabela trarigardo pri la informa laboro 1964

129 Aldone al la informa trarigardo (Becker)
En la grupoj

130 CED: Sliparo pri sciencistoj-esperantistoj

131 Leteroj
Nekrologoj Szakasits, Šidani, Danon, Jesudasan, Gäbler

132 Recenzoj

133 Monda Kulturo (enhavo)

134 Ricevitaj eldonaĵoj

135 Mallongaj novaĵoj

136 La Juna Vivo

137 Esperanto en radio

138 Oficiala informilo n-ro 379

139 Anoncetoj

kovrila bildo

Inter la malfacilaĵoj, kiujn preskaŭ ĉiuj antikvaj lingvoj prezentas al la hodiaŭa studanto, estas tiu de la alfabeto. Sur la bildo: palia teksto sur la pilastro de Laŭrija-Aharaĝ (Foto: Arĥeologia Esploro de Hindujo)

bildojn liveris

122 Prof. G. Mihailov

124 Kiril Draĵev

126 (malsupre) Oomoto

oficiala organo de universala esperanto-asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

esperanto
julio 1965

ĈU PLU INSTRUI LA ANTIKVAJN LINGVOJN ?

En Germanujo (Orienta) okazas vasta diskuto pri la eduka sistemo de tiu lando: diskuto, kiu finiĝos per akcepto de novaj leĝoj. Oni aparte diskutas la rolon de la latina kaj helena lingvoj en la lernejoj. Sed la klasikaj lingvoj de Eŭropo ne estas la solaj antikvaj, kiujn oni pridiskutas en tiu senco. Ankaŭ en Hindujo, kie temas pri la "mortintaj" sanskrita kaj palia, la demando estas aktuala.

La argumentoj favore al instruado de antikvaj lingvoj estas ĉefe: (a) Ili helpas en la uzado de modernaj lingvoj; (b) Ili helpas en la kompreno de sciencaj kaj fakaj terminoj; (c) Ili havigas kulturajn valorojn al la studanto; (ĉ) Ili profundigas la ĝeneralan komprenon pri lingva strukturo. Ĉar tiajn argumentojn oni aŭdigas ankaŭ favore al Esperanto, ni invitis kelkajn diverslandajn kompetentulojn al diskuto pri la temo "Ĉu la studo de Esperanto povas anstataŭi la studon de antikvaj lingvoj?". La respondaj opinioj aperas nun en koncizigita formo sur la sekvantaj paĝoj.

Kiel oni vidas, la opinioj estas tre diversaj,

Opinioj kontraŭdiraj

eĉ foje rekte kontraŭdiraj unu al alia. Klare evidentiĝas antaŭ ĉio, ke la demando ne estas unusence respondebla por ĉiuj landoj kaj rilate al ĉiuj antikvaj lingvoj nun instruataj. Krom kultura kaj eduka aspektoj, la instruado de antikvaj lingvoj povas havi ankaŭ gravan politikan aŭ religian signifon. Necesas ankaŭ konsideri, ĝis kiu grado la moderna lingvo de iu lando jam evoluis sendepende de la praforma lingvo. Jen kiel kontrastas la situacioj de Eŭropo kaj Hindujo:

"Dum la tuta 20-a jarcento", skribas prof. Régulo-Pérez, "ne aperis en Hispanujo (kaj probable malpli en aliaj hispanparolantaj landoj) deko da atentindaj monografioj en la latina, kiu ĝis la fino de la 19-a jarcento estis preskaŭ ekskluzive la lingvo por universitataj disertacioj kaj por konigo de rezultatoj de ciencaj esploroj." En Hindujo, aliflanke, "Dum la pasintaj 2500 jaroj la sanktaj skriboj de la hinduoj kaj budhanoj kaj la teknikaj verkoj de medicino kaj aliaj fakoj estis preskaŭ ekskluzive en la sanskrita kaj palia lingvoj. Nur en la nuna tempo oni tradukas tiujn verkojn en la lingvojn naciajn." (El la respondoj de sanghano Njânasatta).

Pro tiu lasta fakto, laŭ la respondo de s-ro Aŝvinikumar', "oni taksas scion de la sanskrita esence necesa por scii la hindian bone". Sanghano Njânasatta, aliflanke, estas konvinkita, ke "la progreso de la lingvoj naciaj estis multe haltigita per tro multe da studo de lingvoj antikvaj". Evidente, se la fina celo estas bona scio de la moderna lingvo kaj ĝia literaturo, necesas en ĉiu okazo dediĉi al ĝi pli da tempo, ol al la antikva lingvo kaj ties literaturo aŭ al la Internacia Lingvo kaj ties literaturo. Sub tiu kondiĉo — ne okupi tro grandan proporcion de la studotempo — la lernado de kiu ajn fremda lingvo sendube kontribuas al pli konscia uzo de la gepatra lingvo. Ĉe la antikvaj lingvoj tiu kontribuo dependas de la preciza rilato inter difinita antikva kaj difinita moderna lingvoj, dum ĉe Esperanto, pro ĝia regula strukturo, la kontribuo estas pli ĝenerala.

Pri sciencaj kaj teknikaj terminoj la situacio estas tre diversa en diversaj modernaj lingvoj. La hindaj lingvoj ĉerpas siajn sciencajn terminojn ĉefe el la sanskrita kaj palia, kaj tie do Esperanto, kun sia ĉefe latina bazo, ne helpas la komprenon aŭ rekonon de terminoj. Ĉe la modernaj eŭropaj lingvoj, tamen, kaj ĉe la aliaj, kiuj ĉerpas terminojn el la eŭropaj lingvoj, Esperanto certe povas helpi, kvankam estas dubeble, ĉu ĝi faras tion pli bone, ol la studo de la latina aŭ greka. Atentinda estas la opinio de s-ro Halvelik, ke Esperanto povus kaj devus esti pli utila al la sciencistoj, ol la klasikaj lingvoj. Kondiĉo estus, ke ĝia scienca terminaro konformiĝu al la analiza strukturo de la cetera radikaro — oni uzu, ekzemple, la formon *agrokulturo*, kiu akordiĝas kun *agronomio*, anstataŭ la formo *agrikulturo*, kiun necesas lerni kiel apartan radikon.

Pri la kultura valoro de la antikvaj lingvoj regas ĝenerala konsento inter la diskutintoj, ke en la nuna tempo ĝi estas pli granda ol tiu, kiun prezentas la studo de Esperanto, kvankam la lasta malfermas pli larĝan perspektivon. Iam estos eble studi la klasikajn literaturojn per Esperantaj tradukoj, sed tiu stadio ankoraŭ ne estas atingita.

Dependas de lokaj celoj

Por resumi la diskuton necesas diri, ke la ebleco, anstataŭigi la studon de antikvaj lingvoj per tiu de Esperanto, dependas unuavice de la celo de la studoj kaj de la koncerna lando. Se la celo estas plibonigi la uzon de la gepatra lingvo, Esperanto estas verŝajne adekvata (eble ne en Hindujo k.a.). Por kompreno de sciencaj terminoj Esperanto ne sufiĉas en Hindujo kaj similaj landoj, kaj ĝi ne tute sufiĉas ĉe la eŭropaj lingvoj, kvankam principe ĝi povus. Se temas pri akiro de kulturaj valoroj, la diskutintoj opinias Esperanton tre grava, kvankam ne tute egala al la klasikaj lingvoj. Fine, kiel ĝenerala enkonduko al lingvostudoj, Esperanto almenaŭ egalas la antikvajn lingvojn.

Kiel jam pli frue dirite, la decidon, instrui tiun aŭ alian lingvon en la lernejoj, influas politikaj kaj aliaj eksteraj faktoroj. Se inter tiuj faktoroj estus sincera deziro por justa solvo de la monda lingva problemo, jam ne povus esti demando, ĉu instrui la Internacian. La nuna diskuto montris, ke eĉ ekster tiaj konsideroj Esperanto meritas konsideron kiel anstataŭanto de iuj antikvaj lingvoj en la lerneja programo.

LA DISKUTO:

A. Per helpo al la uzado de la propra nacia lingvo

GREGOR:

La studo de Esperanto helpas al la uzado de iu ajn alia lingvo, kondiĉe ke oni komencu ĝin sufiĉe frue. Tiam ĝi atentigas la studanton pri la reguloj kaj la faktoj de la lingvoj ĝenerale kaj faras lin konscia uzanto de propra lingvo anstataŭ nur blinda sekvanto de instinkto.

HALVELIK:

Ne. Ĉar, per studado de siaj antikvaj tekstoj kaj literaturo, oni komprenas kaj regas pli bone la konsiston kaj mekanismon de sia propra nuntempa idiomo. El tiu vidpunkto nia internacia lingvo neniel povas plibonigi la uzadon de la hispana fare de hispanlingvanoj, aŭ de la araba fare de arablingvanoj. Ĝi povas aldoniĝi, se bezone, sed anstataŭi ne.

RÉGULO:

Jam de ĉirkaŭ 30 jaroj mi moviĝas en lernejoj, kiuj ampleksas de la elementa ĝis la universitata niveloj; mi mem instruis la latinan lingvon en liceoj kaj docentis la helenan en universitato, kaj laŭ mia sperto en hispanaj kulturmedioj, mi povas aserti, ke Esperanto multe pli avantaĝe plibonigas la uzadon de la hispana far hispanlingvanoj.

Al liceanoj en la nuna hispana edukplano la latina kaj la helena nur tre malmulte helpas ekster iom da etimologio kaj ankoraŭ malpli da ortografio — kio estas tre magra rezultaĵo por kvar-jara kursado de la latina kaj dujara kursado de la helena. Esperanto, en unu-jara kurso, sub gvidado de kompetenta profesoro, donas tiom multe da praktikaj kaj bazaj prilingvaj konoj, krom aliaj strukturaj, semantikaj, normigaj ktp elementoj, kiuj ĝenerale mankas en la klasika edukado.

LA DISKUTANTOJ

AŚVINIKUMAR': Hindo, licenciulo de la Universitato de Ilahabad pri matematiko (1962), asistento en la Universitato de Amsterdam.

DOUGLAS B. GREGOR: Brito, instruisto de klasikaj lingvoj, tradukinto de Sofoklo, direktoro de la sekcio Gramatiko de la Akademio.

MANUEL HALVELIK: Belgo, aŭtoro de terminologiaj studoj.

NJÂNASATTA: Cejlona ŝtatano kaj sanghano (budhana monaĥo), instruisto de la palia k.a. lingvoj, verkisto.

JUAN RÊGULO-PÉREZ: Hispano, profesoro de romanida lingvistiko kaj de Esperanto en la Universitato de La Laguna; akademiano.



ĈU LA STUDO DE ESI
TAŬI LA STUDON DI

NJÂNASATTA:

Laŭ mia tridekjara sperto kiel lingvisto kaj hindologo, spite la fakton, ke mi estas fakulo en la lingvo palia, mi konstatas, ke la progreso de la lingvoj naciaj estis multe haltigita per tro multe da studo de lingvoj antikvaj. Fakuloj en lingvoj antikvaj ne havis tempon por modernaj studoj, kaj se ili nun influas la formadon de lingvo teknika kaj novaj terminologioj, oni plendas, ke tro multe da sanskrito kaj palio faras ilin malfacile kompreneblaj. Kreado en la lingvo mem estas pli facila ol imitado de fremdaj ekzemploj kaj modeloj.

AŚVINIKUMAR':

La hindia en sia nuna formo ekestis nur fine de la lasta aŭ komence de ĉi tiu jarcento. Ĝi ekestis per kunfandiĝo de aro da dialektoj kiuj estis parolataj en tre granda parto de norda Hindujo. Multaj el ĉi tiuj dialektoj havis grandajn literaturojn. La bazo sur kiu oni kununuigis tiujn lingvojn estis la sanskrita. Ĉiuj tiuj lingvoj akceptis la sanskritan kiel superlingvon kaj en ties literaturoj oni senhezite uzis sanskritajn vortojn. Krom tiu fakto estis nenio komuna al tiuj lingvoj. Ekde la komenco la sanskrita formis la bazon de la ekesto de la hindia. Do scio de la sanskrita estas necesa por plene kompreni la literaturon de la hindia.

La hindia ne havas propran sistemon de vortfarado. Tio kaŭzus gravajn malfacilaĵojn al ĝi. Sed uzante sanskritajn vortojn ĝi ekdisponas la sistemon, kiun posedas la sanskrita. Ĉiel tio tre multe utilas al la hindia.



Helena surskribo (kun iuj latinaj elementoj) el la jaro 172 p.K., starinta super la enirejo de la fortikaĵa muro de Philipopolis (hodiaŭ Plovdiv en Bulgarujo).

ERANTO POVAS ANSTA-ANTIKVAJ LINGVOJ?

B. Per komprenigo de sciencaj kaj fakaj nacilingvaj terminoj

GREGOR:

Dank' al sia bazo el la greka kaj antaŭ ĉio el la latina lingvoj Esperanto estas altgrade kapabla rekonigi al la leganto la radikojn entenatajn en la sciencaj kaj fakaj terminoj.

AŚVINIKUMAR':

Precipe kiam temas pri fakaj terminoj la sanskritaj vortfarado kaj vortprovizo estas grava helpo en la hindia. Unue per uzo de sanskrita vorto en la pura formo oni povas havi terminon kiu diferencas de la ĉiutaga vorto, due oni povas derivi multajn aliajn terminojn de unu baza termino tiel ke oni ne bezonas aparte lerni ĉiun. Tio restas utila eĉ kiam oni devas preni iun fremdan (ekz-e anglan) vorton kiel teknikan terminon.

RÉGULO:

Mia sperto pri la helpo de Esperanto al la scio de sciencaj kaj fakaj terminoj ne estas sufiĉa; tamen mi povis konstati, ke Esperanto eminente helpas la komprenon de botanikaj terminoj al nekonantoj de la latina lingvo — kiuj estas la grandega plimulto inter la hispanaj universitataj diplomitoj.

HALVELIK:

Temas pri terminoj, kiuj konsistas el radikoj kaj afiksoj, ĉerpitaj ĉefe (kvankam ne ekskluzive) el la klasikaj ĉeflingvoj de la eŭropa civilizo, nome: helena kaj latina. La vorto "neologismo" mem estas jam tiaspeca termino ĉar ĝi estas konstruita, tute laŭ Esperanto-maniero, ek de la helenaj n e o s, l o g o s, kaj i s m o s kaj estas tradukebla proksimume kiel "nov-vort-aĵo". Ĉi tie ni havas aferon kun ampleksega sistemo de radikoj kaj afiksoj, kiuj aperas amasege en natursciencaj nomenklaturoj. Konsiderinda nombro estas trovebla jam en P.V., sed tiaj vortoj estas fakte nenombreblaj kiam oni turnas sin al ĥemio, botaniko, zoologio, medicino, geologio, ktp.

Nu, por regi la konstruadon kaj komprenadon de tiaj tutecaj terminoj, la sciencistoj devas vole nevole studi la helenan kaj latinan, eĉ se ilia nacia lingvo havas neniun kulturrilaton kun tiuj mortintaj lingvoj kaj eĉ se la tempo oferata al tiu lingvostudo signifas por ili malŝparegon de energio. Oni konsideru, por preni ekzemplon, la modernan fakmaterialon kiun bezonas ensorbi kuracisto kompare kun la tempo bezonata por studi apartan (klasikan) lingvon.

Al tiu problemego — kie ĝi en principo devus esti kapabla helpi — Esperanto prezentas neniun efektivan solvon. La sciencaj terminoj kiujn ĝi "adoptas" ja fariĝas veraj fremdkorpoj viciĝantaj unu post la alia sen gramatika rilato, kiel peza balasto por la memoro: tiu sama memoro, kiun Zamenhof senŝarĝis tiel genie per sia sistemo de reciproke interrilatantaj kaj unusencaj radikoj kaj afiksoj. Ĝi tamen *devus,* pro siaj principo kaj naturo mem de internacia interkomprenilo, mastri ĉi tiun gravegan nomenklaturon kaj prezenti al la sciencistaro, same kiel ĝi jam faris por la "ĝenerala publiko" rilate al aktualaj lingvoj, memstaran instrumenton kiu senigus ilin je la peniga laboro studadi eksterfakajn arkaikajn lingvojn. La sama situacio aperas ankaŭ — en iom alia kadro — ĉe la alpreno de terminoj kiuj fontas el ne-eŭropaj lingvoj, kiel la budhisma nomenklaturo ekzemple. Plej elstara kaj decida en tiu problemo, laŭ mia opinio, estas efika transpreno de la funkcio pri *scienca* nomdonado al plantoj kaj bestoj, kiun funkcion en ĉiuj nacioj de la mondo plenumas ankoraŭ ĉiam la helenlatinidaj nomenklaturo kaj sistemo. Kaj ĉi tiun sekvas je mallonga distanco la ĥemiaj nomenklaturo kaj sistemo.

C. Per havigo de kulturaj valoroj al la studanto

RÉGULO:

La Esperanta literaturo *n e* valoras la latinan por havigo de kulturaj valoroj al studanto; ankoraŭ longe oni devos studi, ĉu rekte, ĉu per tradukoj, la latinan kaj la helenan literaturan heredaĵon en Okcidento, la sanskritan kaj la ĉinan en Oriento, kaj inter ambaŭ kultursferoj la araban kaj eventuale aliajn, laŭ la kazoj.

Studo de antikvaj lingvoj (daŭrigo)

HALVELIK:

Studo de la propra arkaika lingvo, aŭ de tiu kiu ludis decide gravan rolon en ekesto aŭ konsisto de la moderna komprenigilo nacia, signifas por ĉiu aparta gento samtempe studadon de la propra historio, de la propraj kulturtrezoroj, de la propra civilizo. Ke Esperanto estas bonega transportilo por konatiĝi kun "fremdaj" kulturoj kaj nacioj plu ne bezonas emfazon, mi pensas.

AŜVINIKUMAR':

La sanskrita havas tre altrangan literaturon kiu konsistigas nian kulturon. Kompreneble oni ne studas la plej altnivelan literaturon en la lernejoj sed tie oni ekhavas la bazan scion kiu povas instigi kelkajn poste legi la sanskritan literaturon por propra plezuro. La hindia poezio, novelo, dramo ktp havas sian fonton kaj tradicion en la sanskrita. Scio ekz-e de la sanskrita metriko estas nepre necesa por kompreni la hindian poezion. Plie studado de verkoj kiel "Panĉatantra" kaj de sentencoj en la sanskrita estas efektive tre utila por la lernantoj ĉar ili enhavas instruon kiu plifortikigas la karakteron kaj igas ĝin pli taŭga por fronti la mondon.

NJÂNASATTA:

En religio kaj filozofio la perdo de krea forto, fido kaj konvinko kaj kontakto kun la vivo reala estas atribuataj al troa studo de lingvoj antikvaj. Rekta komunikado kun la vastaj tavoloj de la popoloj estas perdita pro sinokupo pri lingvoj antikvaj. Se la Esperanta literaturo ne egalas tiun de lingvoj klasikaj, tio povus ŝanĝiĝi rapide.

GREGOR:

Esperanto estas jam granda, por ne diri grandioza, deponejo de la monda kulturo. La erudiciemulo povas pli facile kaj pli rapide ekipi sin per konoj pri la literaturaj kaj artaj atingaĵoj de diversaj landoj pere de Esperanto ol per iu ajn alia lingvo. Tiuj kulturaj valoraĵoj estas pli dense disponeblaj en Esperanto ol ie alie. El ili la tradukitaj verkoj prezentas valorojn preskaŭ egalajn al la originalaj, kiuj ne estas malsuperaj al tiuj de la antikva Grekujo kaj Romio. La originala literaturo posedas verkojn, se ne samnivelajn kun la ĝis ni savitaj verkoj el la antikveco, frukto kiel ili estas de jarcentoj da evoluado, tamen valorajn en si mem kaj el kiuj la homa menso povas tiri intelektan ĝuadon kaj spiritan profiton. Se ni diras, ke la esperanta literaturo ne povas egali la grekan kaj/aŭ la latinan, ni povus ankaŭ diri la samon pri la angla kaj tiuj.

Ĉ. Per profundigo de la ĝenerala kompreno pri la naturo de lingvo kaj pri lingva strukturo

RÉGULO:

Tiun ĉi demandon mi jam respondis sub A: Esperanto ĉefe kunhelpas analizi, dank' al sia logika strukturo, la strukturon de la hispana, kaj sekve la *tuta* kompreno de la hispana fariĝas pli kohera kaj facile alirebla.

HALVELIK:

Esperanto estas elstare racia kaj prezentas iel la trabaron mem de la homa pensprocedo. Sekve ĝi devas esti ankaŭ bona instrumento por havigi pli da kompreno por kaj pli da lumo pri ĉies propra nacia lingvo. Sed ankaŭ ĉiu nova fremda lingvo, kiun oni lernas, same malkaŝas neatenditajn aspektojn (ĉu pli simplajn ĉu pli kompleksajn) de la enformuligo de pensoj. Kaj ju pli komplikita iu lingvo estas, des pli ĝi ekzercas la analizkapablon. El tiu vidpunkto arkaikaj lingvoj, kiuj estas komplikitaj preskaŭ laŭdifine, staras en la unua vico. Mi do ne kuraĝas esprimi firman opinion por aŭ kontraŭ unu el la du luktantoj.

NJÂNASATTA:

Esperanto certe pliprofundigus la ĝeneralan komprenon pri la naturo de lingvo kaj pri lingva strukturo nur post dujara mezintensiva studado same bone kiel post 20 jaroj da tre intensiva kaj faka studado de iu ajn el la lingvoj antikvaj kaj modernaj.

GREGOR:

Mi konvinkiĝis el propra sperto, ke tiu, kiu lernas Esperanton en frua aĝo, gajnas netrotakseblan komprenon pri la bazaj principoj de la lingva strukturo, dank' al kiu kompreno li estas samtempe stimulata lerni aliajn lingvojn kaj intelekte ekipita kontentigi tiun deziron.

Malnovslava surtomba skribaĵo de la bulgara reĝo Samuil, el la jaro 993 p.K., trovita en vilaĝo Prespa en suda Makedonujo.



LASTAJ PROGRESOJ DE LA SUBSKRIBO-KOLEKTADO

la jaro de internacia kunlaboro, jaro de la int. lingvo esperanto

Kolektivaj rapide kreskas; individuaj ankoraŭ lamas

Kiel montras la suba grafikaĵo, la nombro de subskriboj ricevitaj en la C.O. en Rotterdam ĉiam pli rapide kreskas en ambaŭ kategorioj — individuoj kaj kolektivoj (organizaĵoj). Tamen nur tiu de la kolektivaj estas relative kontentiga. Rilate la varbadon de individuaj subskriboj, multo restas urĝe farenda jam antaŭ la limdato en oktobro 1965. Tio precipe validas por kelkaj landoj, kie la ĝis nun akiritaj rezultoj neniel respondas al la relativa forteco de la landa kaj lokaj organizoj. Eĉ en Danlando, kie la subskriboj de unu triono de la registaro kaj unu triono de la parlamento (ĉefe dank' al la laboro de s-ro Schleicher) kreis tre bonan bazon por la kolektado, la atendita amasa varbado de individuoj ankoraŭ ne realiĝis.

Jen la preciza stato de la statistiko de la C.O. je la 16-a de junio: **165.548** individuoj en 47 landoj; **865** organizaĵoj en 24 landoj, kun sume **23.760.000** membroj.

Analizo de la unuaj cent miloj

Adicio laŭ kategorioj de la unuaj 100.000 individuaj subskriboj montras, ke el ili estis 22 membroj de registaroj (inter kiuj unu ŝtatestro — la nova prezidanto de Aŭstrujo s-ro Franz Jonas) kaj 170 parlamentanoj. Ĉirkaŭ 10 elcentoj estas instruistoj diversgradaj. Al tiuj unuaj 100.000 plej multe kontribuis Germanujo (precipe Sarlando), Belgujo kaj Francujo, laŭ tiu ordo.

Pliaj eminentuloj

Inter la nove subskribintoj ni menciu unue la membrojn de registaroj: en Danlando s-ro Erling Dinesen, laborministro; s-ro Victor Gram, defendministro; s-ro Hans Hækkerup, ministro pri enlandaj aferoj; s-ro Kaj Lindberg, ministro pri publikaj laboroj; s-ro Hans Sølvhøj, ministro pri kulturaj aferoj; s-ro Chr. Thomsen, ministro pri agrokulturo; en Urugvajo s-ro Juan E. Pivel-Devoto, ministro pri publika instruado kaj socia antaŭzorgo; en Francujo s-ro J. Bordeneuve, eksministro pri eduko; s-ro B. Chochoy, la eksministro de konstruo; fine en Argentino prof. J. Fentanes, eksministro de publika instruado. La apogon de dana ministro Per Hækkerup (foto) ni jam menciis en la junia "Esperanto".

En Francujo krome elstaras akademiano Jean Rostand, la senata vic-prezidanto s-ro A. Méric kaj generaloj G. Malraison kaj J. Charbonneau; en Urugvajo dekano kaj profesoroj de la Universitato de Montevideo; en Belgujo prof. Pol Swings, monde konata fizikisto kaj prezidanto de la Internacia Asocio de Astronomio, kaj aliaj profesoroj en Liège; en Bulgarujo la ĉefsekretario de la Nacia Komisiono por Unesko, kaj aliaj eminentuloj inter kiuj la romanisto Georgi Karaslavov. Restas mencii la urbestrojn de Kopenhago, Fortaleza (Brazilo), Nancy (Francujo) k.a. grandaj urboj kaj pliajn parlamentanojn el Bulgarujo, Danlando, Francujo, Hungarujo, Italujo, Nov-Zelando, Svisujo kaj Usono.

Milionaj organizaĵoj

Sed la ĉefa progreso en la lasta monato rilatas la kolektivajn subskribojn: tiurilate la suba grafikaĵo jam malaktualiĝis. Al la salto ĝis pli ol 23 milionoj da membroj ĉefe kontribuis gravaj subskriboj el Jugoslavio kaj Bulgarujo. En Jugoslavio: la Ruĝa Kruco (3.850.000), la Asocio de Militveteranoj (1.400.000), la Unuiĝo de Ligoj por Edukado de Infanoj (400.000), Skolta Asocio (133.800) k.a. En Bulgarujo: la Organizaĵo de Bulgaraj Sindikatoj (1.800.200), la Ruĝa Kruco (1.700.000), la Bulgara Turista Asocio (800.000) k.a. Krome subskribis en Belgujo la Ĝenerala Federacio de Laboristoj (785.000), en Francujo la "Touring Club de France" (500.000), la Ĝenerala Konfederacio de Laboro "Force Ouvrière" (1.000.000), la Internacia Federacio de Fervojistaj Artistaj kaj Intelektulaj Societoj (500.000) kaj aliaj.

Per tiuj ĉi aldonoj la nombro de kolektivaj subskriboj jam larĝe superis tiun de la Peticio al U.N. en 1952. Ĉiu kunhelpu, por ke ankaŭ la individuaj subskriboj atingu kaj superu la tiaman ciferon !



Per Hækkerup, dana ministro pri eksterlandaj aferoj

La suba grafikaĵo montras la akceliĝon de la subskribo-kolektado de monato al monato. Intertempe la linio de la kolektivaj subskriboj jam plue altiĝis ĝis la nivelo de preskaŭ 24 milionoj.



Naokazu Kawasaki

KELKAJ ASPEKTOJ DE

La japana lingvo estas parolata de ĉirkaŭ 90,000,000 japanoj en Japanujo kaj en Luĉo (Okinawa). Krome, ĝin konservas japanaj elmigrintoj al Usono kaj aĺ Brazilo (ĉirkaŭ 90,000).

En Hokkaido, la plej norda insulego en Japanujo, loĝas tre malmulte da ainoj, parolantaj la ainan lingvon, kies aparteneco lingvofamilia ne estas klara. Ĉar Koreujo kaj Formoso estis japanaj kolonioj ĝis 1945, tie la japana lingvo estas, eĉ nun, komprenata inter nejunuloj. Male, plejparto da junaj koreoj, loĝantaj en Japanujo, ne scipovas paroli la korean lingvon.

Sonsistemo

La specoj de la japanaj vokaloj estas, samkiel en Esperanto, nur kvin: a, e, i, o, u. Japanoj, lernante la francan lingvon (aŭ la germanan lingvon) povas, nek aŭde nek parole, distingi ĝiajn vastajn e, o disde ĝiaj malvastaj. Tial tiel lerte ellaborita vokalsistemo (sep koloroj) de Kalocsay en la Plena Gramatiko restas malinteresa por japanaj esperantistoj.

Profesoro Mario Pei rimarkigas, ke en la japanaj vortoj, vokaloj estas tiel oftaj, kiel en la itala lingvo, sed ĝia riĉeco de guturaloj memorigas la nederlandan lingvon. Unu ekzemplo: *gengogaku* 'lingvoscienco'.

Alilandaj esperantistoj certe miras, ke japanaj komencantoj ne faras distingon inter *ili* kaj *iri*, inter *sufero* kaj *sfero*. La kialoj estas, ke en la japana lingvo ne ekzistas l, sed nur r, sono mistera por fremduloj, kaj la japana u estas sono malklare elparolata (sen rondiĝo de lipoj).

Alia interesaĵo por nejapanoj estas ekzisto de ia speciala elparolmaniero de duoblaj konsonantoj. Latinlitere oni skribas: *kitto* 'nepre'. Atentinde estas, ke *kitto* ne estas dusilaba, sed trisilaba. La unua t en *kitto* similas al la unua t en la itala *atto* 'akto', sed ĝi, t.e. neaŭdebla parto, formas unu silabon. Do, se oni permesus tian japanmanieran elparolon de duoblaj konsonantoj, por japanoj distingi *budon* disde *Buddo* estas tre facile.

japana belskribo



Gramatiko

La japana lingvo uzas ne prepoziciojn, sed postpoziciojn. Kaj la interligiteco inter substantivo kaj postpozicio estas fonetike malstrikta, ĉar ĉe tio ne okazas fonetika ŝanĝiĝo.

mati (maĉi)	'urbo'
mati o	'urbon'
mati e	'al urbo'

mati restas en la sama fonetika formo.

Ni vidu la latinan lingvon.

urbs	'urbo' (nominativo)
urbem	'urbon' (akuzativo)
urbi	'al urbo' (dativo)

s, em, i ne estas sendependaj elementoj.

En la angla lingvo prepozicioj estas sendependaj, do tiu lingvo havas analizan econ.

of a town	'de urbo'
to a town	'al urbo'

Inter la altajaj lingvoj, en la turka lingvo (skribo esperantigita)

iŝ	'afero'
iŝin	'de afero'
iŝi	'aferon'
ĉene	'mentono'
ĉenenin	'de mentono'
ĉeneji	'mentonon'

LA JAPANA LINGVO

La duspececo de finaĵoj devenas de tio, ke unu radiko finiĝas per konsonanto, dum la alia per vokalo.

En la malsupra ekzemplo, eĉ la radiko ŝanĝas sian formon fonetike.

ĉoĝuk	'infano'
ĉoĝuun	'de infano'
ĉoĝuu	'infanon'

Sed pri tia formoŝanĝiĝo ni ne povas diri, ke la turka lingvo havas fleksian deklinacion kiel en la latina. Ni diru, ke tio estas kunmetaĵo de radiko kaj finaĵo. Tamen, tiuj finaĵoj ne estas sendependaj, malsimile al la japana.

En la finna lingvo, unu el la uralaj lingvoj, oni trovas 15 kazojn. En kelkaj kazoj, la radiko ŝanĝiĝas fonetike antaŭ sia finaĵo.

pata	'poto'
padan	'de poto', 'poton'

La interligiteco inter radiko kaj ĝia finaĵo ne estas malpli strikta ol tiu en la latina. Oni povas diri, ke tie ekzistas fleksio.

Resumante la suprajn ekzemplojn, Profesoro T. Sibata konkludas: 1. La latina estas la malplej analiza. 2. Ĝin sekvas la finna. 3. La turka estas kompare bone analizebla. 4. Komparate kun la aliaj lingvoj, rimarkinde estas, ke la japana lingvo estas ege analiza, multe pli analiza ol la nuntempa angla lingvo.

Lingvofamilio

Al kiu lingvofamilio apartenas la japana lingvo? Fonetike ĝi similas al la Pacifikaj lingvoj, ekz. la samoa, la malaja. Vidu malmultecon de vokalspecoj, malfermitecon de silaboj, k.a. Gramatike ĝi similas al la altajaj lingvoj, ekz. la korea, la mongola. Vidu algluecon de elementoj, postpoziciojn, vortordon, k.a. Sekve, por determini la apartenecon de la japana lingvo, naskiĝis du skoloj inter lingvistoj: nordistoj kaj sudistoj. Kaj ambaŭ longe kverelis.

Fine, por kompromisi la du skolojn, aperis la tria skolo, kiu insistas, ke en Japanujo unue loĝis popolo kun sudmara lingvo kaj poste venis popolo kun altaja lingvo por konkeri la landon. La lingvo de la dua fariĝis la lingvo de Japanujo, sed ĝi devis ricevi influon de la unua lingvo. La rezulto estis: dum la gramatikaj karakteroj estas tiuj de la altaja lingvo, la fonetikaj karakteroj ŝanĝiĝis en la direkto de la sudmara lingvo.

En komparado de lingvoj, aldone al fonetiko kaj gramatiko, la tria elemento neneglektebla estas vortoj. Sed la vortoj de la japana lingvo estas rekoneblaj nek en lingvoj nordaj, kvankam gramatike ambaŭ estas similaj, nek en lingvoj sudaj, kvankam fonetike ambaŭ estas similaj.

Koreoj estas la najbaroj, la plej proksimaj najbaroj de japanoj. En politiko kaj kulturo la interrilatoj inter koreoj kaj japanoj komenciĝis de tre antikva tempo. Tion pruvas la historio kaj la arkeologio. Sed, malgraŭ la gramatika simileco inter la du lingvoj, lingvistike kompareblaj vortoj estas maksimume nur 500 (kompreneble, esceptinte tre grandan nombron da importitaj vortoj el la ĉina lingvo — ambaŭ landoj estis sub la influo de la ĉina kulturo).

Konklude, la definitiva solvo de la lingvofamilia problemo pri la japana lingvo ankoraŭ ne estas atingita.

Kie legi la prelegojn de la INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO

ISU 1963, Sofio

DINEKOV, prof. Petr: "Evoluo de la bulgara literaturo", Nuntempa Bulgario 1963, nov. p. IV, dec. p. VI.

KOLKER, s-ro Boris: "Rezultoj de permaŝina tradukado el la rusa lingvo en Esperanton", Bulgario 1964, n-ro 1 (ampleksa resumo).

WARINGHIEN, prof. Gaston: "La ellaborado de la Esperanta leksikologio", Monda Kulturo vintro 1963/4, n-ro 6, p. 161.

WÓJCIK, d-ro Tadeusz: "La racia muzikskribo", Pola Esperantisto 1963 n-ro 3, p. 8; aperis ankaŭ kiel aparta broŝuro.

ISU 1964, Hago

KAWAMURA, prof. Sin'itirô: "Japanaj manĝaĵoj de nutrokemia vidpunkto", Scienca kaj Teknika Rondo de Grajnoj en Vento, 1964 n-ro 4, p. 55.

LAPENNA, prof. Ivo: "La homaj rajtoj en la Universala Deklaracio kaj Eŭropa Konvencio", Revuo Esperanto 1965, junio (koncizigita).

RÉGULO Pérez, prof. Juan: "La hispana kontraŭ la prakanariaj lingvoj", Monda Kulturo vintro 1964/5, n-ro 10, p. 1.

WARINGHIEN, prof. Gaston: "La evoluo de la Esperanta vorttrezoro", Monda Kulturo 1964 aŭtuno, n-ro 9, p. 263.

TABELA TRARIGARDO PRI LA INFORMA LABORO EN 1964

Landa Asocio aŭ teritorio (Informa Fako)	Adreso de la Informa Fako aŭ kunlaboranto	artikoloj	informoj	Prelegoj	ĉeestintoj	Radio, TV	Ekspozicioj	ĉeestintoj	Distrib. informiloj
Aŭstralia	Diversaj raportintoj	40	10	5	70	2	—	—	100
Aŭstria (IF)	Walter Mudrak, Beatrixgasse 1979, Vieno III	50	100	?	?	50	1	1340	4500
Belga (IF)	Flandra: G. Maertens, Prins Leopoldstr. 51, St. Kruis. Valona: de Cuyper, 66 rue de Dorlodot, Monceau-sur-Sambre	7	20	3	176	1	6	900	6600
Brazila (IF)	Prof. C. Domingues, Rua Alvaro Alvim, 27ap61, Rio	200	5600	55	4200	405	15	70000	40500
Brita (IF)	BEA, 140 Holland Pk Ave, W. 11.	?	?	?	?	15	3	?	10000
Bulgara (IF)	Simeon St. Hesapĉiev, str. Tintjava 12, Sofia	97	78	98	19700	6	41	17500	17000
Dana (IF)	Ole Schrøder, Ved Sønderport 19, Kopenhago S	45	264	3	80	1	—	—	14219
Finna (IF)	E-Asocio de Finnl., P.K. 5022, Helsinki	45	74	17	2000	1	3	400	2000
Franca (IF)	André Bourdeaux, 164 rue de Saussure, Paris XVIIe	570	327	194	9408	7	9	1680	8461
Germana (IF)	Bernhard Zenker, 645 Hanau, Ramsaystr. 15	989	1391	93	3737	28	33	5250	178217
Hinda	S-ino Haudebine, P.B. 604, New Delhi	3	5	3	275	1	—	—	400
Hispana (IF)	S. Aragay, Arce 8-2-4, Cornella	110	80	12	700	3	2	300	920
Islanda	B. Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavík	?	?	?	?	2	?	?	?
Israela (IF)	A. Manor, Tel Aviv, Hanniversitata 5/4	12	50	14	800	5	3	1000	1990
Itala (IF)	R. Pennazio, CP 248, Torino	200	500	65	6500	44	12	54430	54075
Japana	Diversaj raportintoj	10	15	?	?	—	30	6000	30000
Jugoslavia	Loka Kunlaboranto	10							
Kanada (IF)	F. Brandenburger, 65 High Park Blvd. Toronto 3	26	22	6	210	3	12	2700	1281
Konga (IF)	B.P. 7579, Léopoldville 1	4	14	1	100	2	—	—	360
Madagaskara	E-Asocio de Madagaskaro, 176 R.C. Ankorahotra, Tananarive	2	3	3	150	5	1	300	284
Malta	Carmel Mallia, 89 Old Governor's Palace Str. Vittoriosa	4	—	—	—	—	—	—	64
Meksika	A. Zepeda, Altamirano 75-1 México, 4 D. F.	6	5	3	46	—	1	46	1000
Mozambika	Raposo, CP872, Lourenço Mar.	8	—	—	—	—	—	—	—
Nederlanda (IF)	Woessink-Boet, Vondellaan 47. Arnhem	38	36	1	?	1	2	100	3500
Norvega (IF)	L. Anjer, Boks 7, Oslo-Nord strandhøgda	11	430	19	975	1	—	—	710
Novzelanda (IF)	B. Harvey, 21 Stoke Str. Newtown, Wellington S. 1.	5	193	2	1160	7	—	—	4000
Sudafrika	PO Box 10516 Johannesburg					1	3	61000	
Sveda (IF)	E. Carlén, Yxhult, Hällabrottet	176	491	204	14100	3	2	—	35450
Svisa (IF)	A. Baur, Hangweg 57, Liebefeld	60	18	10	900	2	4	890	2430
Urugvaja (IF)	Río Branco 1556 Montevideo	2	30	2	150	3	2	?	982
Usona (IF)	B. Stollman, Esperanto Inf. Cent. 180 Riverside Drive New York	18	10	40	1000	15	12	50000	18512
Venezuela	Apartado del Este 4845, Caracas	5	6	2	30	—	—	—	14
Vjetnamia	Loka Kunlaboranto	8	—	—	—	—	—	—	—
33 respondoj		2661	9772	855	66467	614	194	573836	437469
28 respondoj	Ciferoj por 1963	3908	10668	826	52959	774	172	274030	366611
33 respondoj	Ciferoj por 1962	4497	11595	1753	94348	949	355	392404	468660

ALDONE AL LA INFORMA TRARIGARDO

Günther Becker, Estrarano pri Informado

Krom la raportoj, kies ciferoj estas prezentitaj en la Tabela Trarigardo, atingis min raportoj de: Internacia Naturista Organizo Esperantista (S-ro Leif Heilberg, 1878 19th Avenue, San Francisco, Cal. Usono), Universala Medicina Esperanto-Asocio (D-rino Maria Jarnuszkiewicz, Mazowiecka 69, Krakovo, Pollando), el la Kunlaborantaj Fakaj Asocioj; de Budhana Ligo Esperantista (Rev. F. Moravec, Fördestr. 15, 239 Flensburg-Mürwik, Germanujo), el la Neneŭtralaj Organizoj Kunlaborantaj; kaj de Societo por Internacia Lingvo (D-ro A. Bormann, Jens-Due-Str. 25, 239 Flensburg, Germanujo). La Societo por Internacia Lingvo aperigas kvaronjare sciencan informservon "Interlingvistika Informa Servo", kiu estas tre rekomendinda por ĉiuj Informaj Fakoj el multaj vidpunktoj. La raportoj estas tre interesaj kaj montras la gravecon de la informa laboro de fakaj kaj aliaj organizaĵoj.

Mankas respondoj

Estas tre malfacile en la nuna momento doni ĝustan pritakson de la atingitaj ciferoj por la jaro 1964 en komparo kun antaŭaj jaroj, ĉar el kelkaj landoj sufiĉe gravaj laŭ tiu vidpunkto mankas ankoraŭ la respondoj entute aŭ ne venis ankoraŭ de la kompetenta instanco kaj mi nur povis enmeti tion, kion mi havis el aliaj fontoj. Entute mankas respondoj el Hungarujo kaj Pollando, sed ankaŭ por Jugoslavio mi nur povis doni malgrandan ciferon.

Mi esperas, ke venos ankoraŭ kelkaj respondoj kaj ke la ciferoj ankoraŭ altiĝos kaj almenaŭ atingos la lastjaran finan stadion. Se la limdatoj estas tiel malfruaj kiel la niaj, ĉio devus esti en ordo ĝis fino de majo post ĉiuj admonoj, interveno de komitatanoj ktp.

Sed plendoj ne helpas: ni rigardu la situacion entute, prenante la ĝisnunajn ciferojn en konsideron. Evidente ili signifas pozitivan agadon, sed se ni volas vere popularigi Esperanton, ni devas fari pli grandajn streĉojn kaj precipe lerni de la landoj, kiuj atingis bonajn ciferojn. Bedaŭrinde la spaco ne permesas doni ĉiujn detalojn el la aliaj respondoj kaj aldonaj leteroj. Ĉar ĝenerale la konkludoj estas similaj al tiuj de la lasta jaro, oni bonvolu legi paĝon 129 de la julio aŭgusta numero 1964, kie s-ro Sven Ziegler donis multajn klarigojn, same kiel en la ĉefartikolo de la sama numero. Estas aferoj, kiujn oni ne tro ofte povas ripeti.

Lokaj informaj fakoj

En la landoj kun bonaj rezultoj kompreneble ne nur ekzistas bone laboranta landa informa fako, sed pli kaj pli aktiviĝas lokaj informaj fakoj; sur loka nivelo ekzistas ja unikaj eblecoj por informado. Bonvolu nepre en tiu rilato konsulti mian artikolon en la marta numero 1965 paĝo 42, la diversajn laborplanojn kaj ne laste la Principaron de Frostavallen al kiu nun ĉiu unuopa Esperantisto havas denove aliron sen longa serĉo, ĉar ĝi aperis en la Jarlibro 1965, paĝoj 38-42. Mi povas diri al vi, ke la Jaro de la Internacia Kunlaboro preskaŭ ĉie en la mondo ĝis nun jam donis bonajn okazojn por informi en kunligo kun la subskribkolektado kaj ke tutcerte la ciferoj por 1965 estos multe pli altaj ol en ĉiuj antaŭaj jaroj. Tamen oni devas sekurigi tiun situacion kaj starigi la informajn fakojn landajn kaj lokajn sur tiel firmajn bazojn, ke tiu stato povos daŭri en la venontaj jaroj. La Informa Fako de UEA liveris kaj liveros abundan materialon al la landaj informaj fakoj kaj individuaj kunlaborantoj. Ĉiuj tiuj informoj devus laŭeble ankaŭ atingi ĉiujn lokajn grupojn kaj la unuopajn esperantistojn, kiuj intencas sin pli dediĉi al informaj taskoj. Se ankoraŭ ne ĉie okazis, la nomitaj instancoj volonte disponigas prunte la materialon. Por apartaj demandoj oni povas ĉiam direkti sin al mi aŭ al la Vicprezidanto s-ro Erik Carlén, kiu speciale okupiĝas pri ellaboro de ĝenerala plano pri informado, kiu konvenas ĉie kun landaj modifoj. Pli kaj pli la dokumentoj de CED devos esti utiligataj aŭ adaptitaj al la specialaj informaj bezonoj, kiel unu lando jam faris per eldono de du broŝuroj: unu ĝenerala kaj unu pri lernejaj problemoj kaj eduka valoro de Esperanto. Tiu lando estas Germanujo, de kiu mi ricevis du raportojn de Germana Esperanto-Asocio kaj de Germana Esperanto-Junularo kun okpaĝa aldono. Plej interesaj estis tie la ideoj por plibonigi la informan laboron, al kiuj mi ankoraŭ revenos. Aparta ĉapitro pri Informado ankaŭ aperos en la Estrara Raporto. Mi kore dankas al ĉiuj kunagantoj sur la gravega kampo de nia informado.

EN LA GRUPOJ

Jen kelkaj sugestoj por agado de lokaj grupoj en la venontaj monatoj:

1. *Daŭre kolekti subskribojn* por la Propono al Unuiĝintaj Nacioj, bazante sin sur la ĝisnunaj atingoj (vidu p. 125). Subskribo-foliojn ankoraŭ liveras UEA kaj la landaj asocioj.

2. *Kontribui magnetofonan programon* (dramon, prelegon, k.s.) al la Magnetofona Servo de UEA kaj mendi alian programon interŝanĝe. (Vidu Jarlibro 1965/I, p. 143).

3. *Por lingva ekzercado,* peti la klubanojn difini en Esperanto vortojn elektitajn el Plena Vortaro.

CED

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO
77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex,
Anglujo. Telefono ARNold 9081

FARIĜU ABONANTO DE LA DOKUMENTOJ DE CED EN LA INTERNACIA LINGVO: 5,50 GULDENOJ JARE (22 STELOJ)

SLIPARO PRI SCIENCISTOJ-ESPERANTISTOJ

Nova enketo de CED

Montriĝis, ke estus tre utile havi konkretajn informojn pri ĉiuj sciencistoj, kiuj kapablas aktive aŭ almenaŭ pasive uzi la Internacian Lingvon. Krome, pro diversaj kaŭzoj, estus bone havi la samajn informojn pri forpasintaj sciencistoj, precipe pri tiuj, kiuj forpasis post 1950. Tial ISAE kaj CED komisiis s-ron Wim De-Smet, Drogenberg 36, Overijse, Belgujo, entrepreni enketon pri tiu demando. S-ro De-Smet, kiu volonte akceptis tiun taskon, direktas al ĉiuj sciencistoj-esperantistoj, al la kunlaborantoj de CED kaj al ĉiuj aliaj, kiuj povas helpi per informoj, la suban alvokon. CED varme petas ĉiujn, al kiuj ĝi estas direktita, plenumi ĝin kiel eble plej baldaŭ kaj tiamaniere helpi al realigo de tiu grava tasko.

Alvoko por Kunlaboro

Certe la nombro de sciencistoj kiuj kapablas kompreni Esperanton, estas multe pli granda ol la nombro de membroj de la nunaj esperantistaj sciencaj asocioj.

Antaŭ ol oni entreprenus iun seriozan paŝon por la apliko de Esperanto en iu difinita kampo de la sciencoj naturaj kaj sociaj (en la plej larĝa senco), oni prefere sciu kiom da fakuloj *jam nun* apogus tiun aplikon. Bedaŭrinde, nun ni scias tro malmulte pri tiuj multnombraj sciencistoj, kiuj studis la Internacian Lingvon kaj ne estas aktivaj en la movado, sed certe aprobe salutus ĝian aplikon.

Tial la subskribinto akceptis fari sliparon pri sciencistoj por la Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) en kunlaboro kun la Centro por Esploro kaj Dokumentado (CED). Tia granda laboro estos nefarebla, se ne de ĉiuj flankoj envenos utilaj informoj per la helpo de sciencistoj, studentoj, CED-kunlaborantoj kaj esperantistoj kun longa sperto.

La amasa laboro povas esti multe simpligita, se ĉiuj informas laŭ la sama modelo:

Oni uzu por ĉiu informaro kartonajn aŭ paperajn slipojn de la internacie akceptita modelo (12,5 × 7,5 cm = 5 × 3 coloj). Se oni ne disponas pri tiaj, oni skribu sur papero aŭ skribokarto, zorgante ke la informaro ne kovru pli grandan surfacon ol la indikitan, por ke oni povu eltranĉi la tekston kaj surglui ĝin.

Oni sekvu jenan vicon por la informoj: Lando (majuskloj); Nomo (majuskloj) kaj antaŭnomoj; Naskiĝojaro (eventuale ankaŭ mortojaro); Branĉo de la sciencoj; fako; specialaĵo; Hejma adreso; Instituto aŭ institucio (nacilingve, eventuale kun traduko); Adreso de la instituto aŭ institucio; Sekcio de la instituto aŭ institucio; Funkcio; Kromaj notoj (se necese uzu la dorsan flankon aŭ apartan paperon); Nomo de la informanto; Dato.

En la dekstra supra angulo oni indiku la gradon de fameco per jenaj literoj majusklaj: A: persono kun granda internacia reputacio pro sciencaj meritoj; B: sciencisto kun internacia reputacio en sia fako; C: sciencisto kun reputacio; D: komencanto kun kelkaj studoj; E: komencanto; F: ne plu aktiva en la esplorado, sed en la aplikado aŭ en la instruado.

En la dekstra malsupra angulo oni indiku la konon de Esperanto per romaj ciferoj, kaj la rilatojn kun la Esperanto-movado per minusklaj literoj laŭ jena sistemo:
I: bona kono; II: sufiĉa kono; III: pasiva kono; IV: iama kono; a: aktiva en la Esperanto-movado; b: neaktiva membro de la landa Esperanto-asocio; c: membro de Esp.-fakorganizaĵo, sed ne de aliaj; d: rilatas kun simpatio al Esperanto; e: pli malpli indiferenta.

Oni lasu libera la malsupran maldekstran angulon, por postaj indikoj laŭ la decimala sistemo.

Se informoj mankas (ekz. naskiĝojaro aŭ adreso) tio ne devas malhelpi por fari la slipon: pli bona estas nekompleta informo ol neniu. Tial ankaŭ aldonoj kaj ŝanĝoj ĉiam restas bonvenaj.

Pri la jam mortintaj sciencistoj oni limigu sin al tiuj mortintaj post 1950. La sliparo devas doni pli malpli ĝeneralan ideon pri tiuj el la nuna jarcentduono.

Bonvolu ĉiam rekte sendi al la ISAE-komisiito kaj CED-kunlaboranto pri la afero:

Wim DE SMET,
Drogenberg 36,
Overijse, Belgujo.

EKZEMPLO (redaktita kun la konsento de la koncerna persono):

BELGUJO B/C
VANDERCAMMEN Antoine
1911
Paleontologio: brakiopodoj: spiriferoj
10, rue Herman Richir, Bruxelles 3
Inst. Royal des Sciences Naturelles de Belgique, 31, rue Vautier, Bruxelles 4
Invertébrés primaires (Prim. senvertebruloj)
Directeur de Laboratoire (Laboratoria direktoro)
Inf.: W. DE SMET
25-5-1965 III c

CED/7 KAJ ALIAJ DOKUMENTOJ EN NACIAJ LINGVOJ

La dokumento CED/7, jam publikigita en Esperanto sub la titolo "Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo", jus aperis en 2000 ekzempleroj ankaŭ en la angla traduko. Ĝi estos dissendita, same kiel la aliaj dokumentoj de CED, al ĉiuj regulaj ricevantoj de la CED-dokumentoj en la angla, nome al diversaj gravaj internaciaj kaj naciaj institucioj, institutoj, bibliotekoj, centroj de esploro kaj organizaĵoj. La dokumento, kiun CED eldonis okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro, estas tre taŭga por informi objektive pri la bazaj faktoj rilate la Internacian Lingvon. CED varme rekomendas al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj en la angle parolantaj landoj mendi kiel eble plej grandajn kvantojn de tiu dokumento kaj utiligi ĝin precipe en tiu ĉi Jaro de Internacia Kunlaboro. La prezo por unu ekzemplero estas 0,50 gld.

Laŭ jus ricevita informo, Hispana Esperanto-Federacio nun prizorgas la eldonon de CED/7 en la hispana lingvo. Ĝi baldaŭ aperos en la traduko de la ĉefredaktoro de Boletín Nicolás L. Escartín. La Esperanto-organizaĵoj en hispane parolantaj landoj *bv. mendi la hispanlingvan eldonon rekte de la Hispana Esperanto-Federacio, f-ino Inés Gastón, Avno. Marina Moreno 35/4, Zaragoza, Hispanujo.* CED opinias, ke estus tre utile, se ankaŭ la aliaj landaj asocioj prizorgus la tradukon kaj publikigon de tiu dokumento en la respektivaj naciaj lingvoj.

Listo de aliaj gravaj dokumentoj de CED, riceveblaj en la angla aŭ franca lingvo troviĝas en la Jarlibro de UEA, 1965, Unua Parto, p. 606. CED intence eldonis pli grandajn kvantojn de tiuj dokumentoj, por ke ili estu kiel eble plej vaste utiligataj en la angle kaj france parolantaj landoj.

Ĉiujn menciitajn dokumentojn de CED oni *bonvolu mendi rekte de la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2.*

Donacoj por CED	£	ŝ	p
La stato je la 4-a de marto 1965 . . .	32-	6-	1
S-ro H. Tanner, Germanujo	1-16-		1
S-ro M. Martin, Hispanujo	1-13-		4
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando . .		10-	4
S-ro L. Jolliet, Germanujo		11-	0
S-ro K. McLennan, Britujo	1-	9-	0
S-ro E. F. Dean, Britujo.	5-	0-	0
Gesinjoroj Kennedy, Britujo	5-	0-	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	5-	0-	0
S-ro A. Lienhardt, Francujo	4-	0-	0
S-ro Pedro Nuez, Hispanujo		4-	8
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando . .		10-	4
S-ro E. F. Dean, Britujo	5-	0-	0
S-ro Giesner, Germanujo		16-	2
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando . .		10-	4
Stato je la 4-a de junio 1965	64-	7-	4

Tutkoran dankon al ĉiuj donacintoj. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, aŭ la oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

ĈU "ESPERANTO" ESTAS LEGEBLA ?

leteroj

Laŭ "Esperanto" n-ro 714 (majo 1965) paĝo 89 mi permesas al mi esprimi mian opinion: La pligrandigo de la presliteroj en nia ĉeforgano estas absolute necesega ! Samtempe ege dezirinde estas, ke la Redakcio atentigu la aŭtorojn pri la nemalpli grava neceso prilabori la artikolojn pli esence, malpli amplekse. La legantaro ricevu prefere pli varian, pli riĉan enhavon !

Jan Silhan

Kraków, Pollando, 11 majo 65

Aŭtoroj, aŭdu !

Mi ne konsentas kun la opinio de C. Stanley Otto en "Esperanto" n-ro 714. Mi estas 83-jara kaj legas bone la litertipojn de "Esperanto" (sen okulvitroj !).

Josef Fousek

Přelouč, Ĉeĥoslovakio, 19 majo 65

LA EDUKA VALORO DE ESPERANTO-INSTRUADO EN LA LERNEJOJ

de Raif Markarian

Grava informa dokumento eldonita okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro.

En Esperanto (multobligita) aŭ la angla (presita), ĝi kostas po 0,80 gld. (2 rpk) por ĉiu ekzemplero. Mendu CED-dok. B/1/2 de la Centra Oficejo en Rotterdam.

ÁRPÁD SZAKASITS

nekrologoj

Mortis en Budapest, 77-jara, s-ro Árpád Szakasits, ŝtatprezidanto de la Hungara Respubliko de 1948 ĝis 1950, verkisto. Li lernis E-on antaŭ pli ol 40 jaroj, festparolis en E-kongresoj, kaj estis membro de la Internacia Patrona Komitato en 1959.

BAHMEN ŜIDANI

S-ro Bahmen Ŝidani, dumviva membro de UEA, mortis en Tehran la 27-an de majo. Li estis unu el la pioniroj de Esperanto en Irano kaj en la bahaana movado, kaj verkis kaj eldonis lernolibrojn por persoj.

BEN CION DANON

En aprilo 1965 subite mortis en Petah-Tikva (Israelo) Ben Cion Danon en aĝo de nur 58 jaroj. Li estis aktivulo de la movado en Bulgarujo kaj Israelo, kaj iama delegito kaj fakdelegito de UEA.

J. T. JESUDASAN (1881-1965)

Forpasis en Nagercoil, Madras-provinco, la hinda pioniro J. T. Jesudasan, kiu lernis E-on jam en 1900.

HANS GÄBLER (1889-1965)

La 28-an de aprilo mortis s-ro Hans Gäbler, Oberachern, Germanujo. Per siaj ĉiujaraj vojaĝoj li fariĝis tre vaste konata.

INSULAJ PRAKULTUROJ EL



La libro de teo, de Okakura kakuzo. El la angla tr. T. Nakamura. Eld. KOSMO, Osaka, 1965. 132 p. 18 × 13 cm., cumugie bd. 9,— gld.*

Eŭropo ne plu reprezentas la tutan mondon, same kiel Japanujo ne plu Azion. La mondo ŝanĝiĝis. Hodiaŭ Eŭropo kaj Japanujo estas tempe pli proksimaj ol antaŭ 50 jaroj Parizo kaj Vieno. Tamen tiu "malgrandiĝo" estas nur rezultaĵo de teĥnika kaj industria revolucio, apenaŭ meĥanika realigo, kiu neniel kunportis paralelaĵon sur la spirita sfero, en kiu nia planedo suferas malbenindan disduiĝon, progresantan al distriiĝo: inter Tel Aviv kaj Kairo, Seoul kaj Tokio, Kaapstad kaj Leopoldville estas pli granda distanco ol inter Reykjavík kaj Wellington . . .

Tiuj pensoj ĉirkaŭŝvebis min dum *La Libro de Teo* paroladis al mi pri tute alia estetikismo, evoluinta dum jarcentoj kaj kristaliĝinta ĉirkaŭ la prataoismo, kies kosmogonio kaj mondkompreno konformigis la ĥinan teoismon, tiun admirindan "arto esti en la mondo", poste hereditan kaj evoluigitan de la japana zenismo. Kiel la milito, la scienco aŭ la administracio, la teoismo estas homa institucio. "Ni disvolviĝis laŭ malsamaj linioj, sed troviĝas nenia kaŭzo, ke ni ne kompletigu unu la alian. Vi gajnis ekspansion per la kosto de senripozeco; ni kreis harmonion, kiu estas malforta kontraŭ agreso" (pĝ. 10). Tiu harmonio, ŝuldita al la teoismo, estas en la bazo de ĉiu japana kultura fakto. Okcidento malhavas similan fenomenon.

La libro, dividita en sep ĉapitroj, estas neniel resumebla: ĉiu estas memstara beletra juvelo, kiun oni devas mem trasperti. *Taoismo kaj zenismo, La teĉambro, Artaprecado* unue pleje impresis min; sed postlegoj apertis ankoraŭ pli helajn perspektivojn, pli densan ideasocion, pli riĉan harmonregistron. La libro do fariĝis kohera tutaĵo, el kiu mi ne plu scius ion reliefigi. Mi scias nur, ke ekde nun ĝi apartenas al miaj brevieroj.

Kiam venis *Enciklopedieto Japana,* mi estis konvinkita, ke tiu libro estas apenaŭ superebla. Sed jen *La Libro de Teo* ĝin superatutis ! Ĝia alta normo de rafineco ŝuldiĝas al teoisma prilaborado: tute zamenhofa stilo en sugesta sed ne sintruda lingvaĵo; purega preso, laŭ mana kompostaĵo per klasikaj litertipoj, sur malnoveca helflava papero; metisilka (cumugia) bindaĵo ŝirmita per plastokovrilo . . . Pli ol kiu ajn alia, kiun mi ĝis nun vidis, tiu libro estas la plej larĝe trairebla ponto inter Oriento kaj Okcidento, ĉar ĝi tre bele verigas la versojn de Goethe:

Wer sich selbst und andre kennt
Wird auch hier erkennen:
Orient und Okzident
Sind nicht mehr zu trennen (1).

Samtempe ĝi malfermas pordon al aprecado de la japana artismo, kiun ni ekzemplu per tankao de Rikju:

Al ĉiuj, kiuj
atendas nur la florojn,
mi volus montri
en kampo neĝkovrita
printempajn herbajn ŝosojn.

J. Régulo

(1) Kiu scias kiel li mem kaj la aliaj estas, tiu nepre rekonos, ke Oriento kaj Okcidento estas jam nedisigeblaj.

Bazaj faktoj pri la Internacia Lingvo. Red. I. Lapenna. Dokumento CED/7, Londono, 1965. 18 p. 25 × 21 cm., multobl. 0,50 gld. (2 st).*

CED anoncis por JIK aron da dokumentoj kun faktoj pri la eduka, paciga kaj socia signifo de Esperanto. Ĉi tiu prezentas la bazajn faktojn pri la lingvo, ĝia ekesto kaj malvolviĝo, ĝia socia bazo, ĝia rolo en instruado, literaturo, scienco. Ĝi ankaŭ donas skizan superrigardon super la terminaroj, gazetaro, organizaĵoj kaj nelaste elmontras antaŭdirojn de konataj personecoj pri komuna lingvo, opiniojn pri la valoro kaj signifo de Esperanto kaj la jamajn rekonojn (Ligo de Nacioj, Unesko). La propono al UN fermas la broŝuron.

Per sia konata precizemo D-ro Lapenna kompilis tiun ĉi dokumenton, el kiu oni ĉerpu por siaj prelegoj pri Esperanto dum JIK. Eble ĝi estas modesta komenco por la planita ĝisdatigita dua eldono de "La Internacia Lingvo — Faktoj pri Esperanto".

Oni aĉetu kaj utiligu ĝin !

Reinhard Haupenthal (Germanujo)

(Vidu ankaŭ paĝon 131)

Initiation théorique et pratique à la langue internationale Esperanto, de Pol Denoel. Eld. Sonorilo, Bruĝo, 1965. Nova eldono, 93 p. 21 × 14 cm., il., bd. 4,35 gld. (17,40 st).*

Tiu ĉi dekleciona lernolibreto por francling-vanoj celis precipe la partoprenantojn en la vesperaj kursoj, kiuj bezonas unue simplajn klarigojn, kaj kiuj eĉ la gramatikon el sia lerneja tempo preskaŭ tute forgesis. La nova eldono direktiĝas ankaŭ al la mezlernejaj kursoj, kaj enhavas, krom la klarigoj de gramatikaĵoj kaj de sufiksoj, la vortolistoj, la rakontoj pri "familio Lagranda" kaj demandoj pri ili, ankaŭ diversajn ekzercojn, ĉefe frazojn tradukotajn en Esperanton.

Nur instruinte per ĝi oni povus bone prijuĝi lernolibron. Encititaj laŭdoj de Privat, interalie, kaj ĝenerala impreso el legado konkludigas, ke la nia atingas simplecon kaj klarecon (ne senmanke: kial ekzemple "gérondif" ?).

Mankas loko por atentigi pri etaj malbonaĵoj (ne ĉiuj malgravaj: "milion" anstataŭ "miliono" k.t.p.) kaj pri kelkaj preseraroj.

Franco

Islandaj pravoĉoj, tri rakontoj kaj unu poemo, tr. Baldur Ragnarsson. Eldona Soc. Esperanto, Malmö 1964. 110 p., 19 × 13 cm. Bd. 6,75 gld.; br. 4,25 gld.*

* *Ricevebla ĉe UEA*

La pranorda mitologio, kiun la tradukinto malkovretas al la leganto, havas siajn proprajn leĝojn, krudajn kaj senskrupulajn, tre proksimajn al la rajto de la plifortulo, tamen jam certagrade limigitajn per la socia moralo.

La tri rakontoj temas pri aferoj okazintaj en Islando ĉirkaŭ la jaro 1000 de nia erao, kiam la tiea prapaganeco komencis cedi al la nova kredo Kristana. La malriĉa tero kaj malmilda klimato edukis homojn fortajn, severajn al la aliuloj, sed ankaŭ al si mem, kaj tre sentemajn pri sia rajto. Tamen la realigo de la justeco esence dependis de tio, kiel fortajn aliancanojn la justulo kapablis akiri kontraŭ la potenca maljustulo. Ĝi statis simile, kiel en nia tempo inter la ŝtatoj. Tiurilate en la rakontoj oni povas trovi multe da aktualeco, des pli, ke ilia stilo estas pure realisma, konstatante nurajn faktojn kaj plene lasante la rezonadon al la leganto.

Kiel ekzemplon ni menciu almenaŭ tute koncize la enhavon de la unua, plej ampleksa kaj ankaŭ plej karakteriza sagao.

Hrafnkel, potenca posedanto de grandbieno Adalbol kaj pastro de la dio Frey, mortigas sian junan paŝtiston Einar, kiu spite eksplicitan malpermeson rajdis sur Freyfaksi, virĉevalo, duone dediĉita al Frey. Hrafnkel rekonas sian troseverecon kaj proponas al Torbjorn, la patro de Einar, malavaran kompenson. Sed Torbjorn ne akceptas kaj kun helpo de sia parenco Sam kaj kelke da similaj malgrandbienuloj akuzas Hrafnkel-on sur la Roko de la Leĝparoloj. Sam atingas eĉ tion, ke la Asembleo juĝas Hrafnkel-on kaj kondamnas lin al ekzilo. Sed tiu ĉi malestimas la Asembleon kaj, fidante la propran forton, tute neglektas la verdikton. La Asembleo decidas, senprokraste ataki Hrafnkel-on en Adalbol kaj plenumi la juĝon. Oni vere sukcesas, Sam okupas la bienon, kaj Hrafnkel estas devigita forlasi sian bienon kaj komenci tute novan vivon en iu malproksima, sovaĝiĝinta valo. Eksciinte, ke oni mortigis eĉ Freyfakson kaj bruligis la templon de Frey, li ĉesas kredi je dioj. Per obstina laboro kaj sperta mastrumado li baldau perfekte kulturas la valon kaj iom post iom reriĉiĝas; fine denove per subita atako li regajnas Adalbol-on, forpelante Sam-on.

Tute alian legaĵon la tradukinto prezentas en Völuspá, kiu estas poemo je 57 strofoj pri mistikaj luktoj de la islandaj pradioj kaj gigantoj, ĉar al ĉiu strofo oni devas legi ĉirkaŭe duoblan kvanton da klarigoj por iomete kompreni la sencon de ĝiaj simboloj. Tamen ĝi kompletigas la imagon pri la pranorda literaturo, kiun la tri rakontoj skizis tre streĉe kaj interese.

La traduko estas bela, ĝi pleje proksimiĝas al la antikva stilo de la sagaoj, tamen restante ĉiam tute komprenebla.

La libro estas kompletigita per instrua enkonduko kaj detalaj komentoj.

Eduard Felix (Prago)

En la ĵus aperinta

MONDA KULTURO

(n-ro 11) vi povas legi:

"La karnavalo de la fantazio",
premiita eseo originala de Albert Samyn.
"Meng Ĉiang kaj Van",
ĉina fabelo versigita de Julio Baghy.
"Liang Ŝanbo kaj Ĝu Intaj",
antikva legendo verse rakontita de A. Su.
"Aŭtuna kanto",
versaĵo de Paul Verlaine, tr. J. Varga.
"Majstro de la paletro, ĉizilo kaj plumo",
ilustrita originalaĵo pri Michelangelo.
"Tibor Boromisza",
de Sándor Szathmári: pri hungara pentristo.
"Rektaj linioj kaj unukornuloj",
hodiaŭa poezio de John Knight, tr. Boulton.
"Pygmalion",
versoj de Ovidio, tradukitaj de Kalocsay.
"Mèthilîŝaraň Gupta, nacia poeto",
studo de Annapûrňâ pri fama hinda poeto.
"La morto de unu lingvo",
originala studo-rakonto de Aŝvinîkumâr.
"Anâgarika Dharmapâla",
biografieto de budhisma misiisto el Cejlono.
"Rilke" kaj *"Koperniko"*,
poezio de islandano Hannes Pétursson.



FABELOJ KAJ SCIENCOFIKCIO

El tero kaj etero, de Julia Pióro. Redakto kaj prezento de Baldur Ragnarsson. Eld. Stafeto, La Laguna, 1964. 116 p. 18 × 12 cm. Beletraj kajeroj n-ro 23. 4,50 gld. (18 st).*

El tero kaj etero estas novelaro de nova aŭtorino: Pióro (= plumo, en la pola) — nomo plena je promesoj por verkistino ! La rakontoj, kunigitaj en tiu ĉi volumo, proksimas al la fabela ĝenro, sub kies vesto la aŭtorino kulturas sian filozofion: amo, kompato, pacemo, vivoĝojo, rezigno ankaŭ.

Mi eklegis kun intereso la unuan rakonton *Ekzilo,* en kiu la aŭtorino talente skizas portretojn de princoj kaj korteganoj de la 16-a jarcento kaj plektas vivoplenajn dialogojn. Sed post nodiĝo de la intrigaj fadenoj, la solvo venas abrupte kaj seniluziige, sen alia pravigo ol kortuŝa, morala konkludo. Oni ricevas la impreson, ke Julia Pióro komencis verki romanon kaj ĝin subite forlasis.

Kelkaj rakontoj estas plene fabelaj. Kvankam la leganto iel ironie ridetas, aŭdante fiŝojn aŭ riverojn parolantajn kiel homoj — kiel modernaj homoj, ne kiel fabelestaĵoj —, li volenevole lasas sin kapti de la ĉarmo de la rakontistino kaj volonte partoprenas la ludon. *Severa leĝo* estas, en la sama ĝenro kiel *Ruĝa truto* kaj *La vojo,* malpli sukcesa. Pli subtila kaj pli profunda estas, kiel simboligo de la Morto, la lasta rakonto *Ekscelenco,* en kiu la aŭtorino malproksimiĝas de la fabelo por atingi la fantaston.

Fine, Julia Pióro kulturas la sciencofikcian ĝenron. Se, en *Pasaĝero de Raketo no. 3,* la morala konkludo ne estas evidenta, kaj en *La nevenkebla urbo* iom naiva, la novelo *Brulruĝo* estas pli sukcesa, kaj la dialogo inter la direktorino de la "Instituto de Interhomaj Rilatoj" kaj la reprezentanto de la ribelanta Homaro (jes, de la Homaro, kiu ne konsentas robotiĝi sub pretekesto de "progreso" !) estas vere frandinda peco: ĝi bonege spegulas la disiĝon inter la teknokratoj kaj burokratoj, kiuj laboras por "la bono de la homaro" kaj la homoj, kiuj pli kaj pli perdas la eblecon forĝi mem sian estontecon. Pli ol filozofiumo: trafo en problemon aktualan hodiaŭ, akutan morgaŭ. Entute, la prozon de Julia Pióro oni legas facile, dank' al stilo flua kaj lingvo ĝenerale bona, sed oni ricevas ĝenan impreson de malekvilibro — kiun ankaŭ Baldur Ragnarsson perceptis, kvankam li ĝin ekskuzas —, de foruzado de riĉaj eblecoj por celo ne ĉiam trafita. Ŝajnas, ke Julia Pióro promesas pli, ol ŝi donis en tiu ĉi debuta volumo.

Michel Duc-Goninaz (Francujo)

---

ricevitaj eldonaĵoj

Komento pri la marta kunveno de Moskvo. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1965. 29 p. 14 × 9 cm. 0,35 gld. (1,4 st).*

Resumo: Atakas la "Interkonsiliĝan Renkontiĝon de Reprezentantoj de Komunistaj kaj Laboristaj Partioj" kiel "kontraŭleĝa skisma kunveno".

Juveloj. Diversaj versaĵoj de Nenjo Rimanto. Eld. la aŭtoro, Britujo, 1965. 17 p. 20 × 16 cm.

Esperanto die internationale Sprache (la Internacia Lingvo), de Erich Hölscher. Eld. Germana E-Asocio, Nürnberg. 23 p. 21 × 15 cm. Varba broŝuro precipe por lernejoj. 0,70 g.m.

Osnovy Esperanto, de I. V. Sergejev. Eld. Instituto de Internaciaj Rilatoj, Moskvo, 1961. 126 p. 19 × 13 cm. Lernolibro por rusoj. 1.80 gld. (7,2 st).*

Internacia elektroteknika vortaro esperanta-pola, angla, franca, germana, itala, sveda. Grupoj 07 (Elektrotekniko) kaj 08 (Elektroakustiko). Verkis K. Siwicki. Eld. Pola E-Asocio, Varsovio 1965. 171 p. 21 × 15 cm., ofsetita. 3,10 gld.*

Urach. Eld. Städt. Verkehrsamt Urach, Germanujo. Senpaga turisma prospekto kun E-lingva aldono.

Baranya. Mapo kun esperantaj klarigoj. **Abaliget.** Turisma prospekto kolorfota. Ambaŭ eldonis: Fremdultrafika Oficejo de Departemento Baranya, Pécs, Széchenyi tér 9, Hungarujo.

Tiaj ni estas, rakontoj de Sandor J. Bako. originalaj kaj kompilitaj. Eld. AL-BA Libroj, Los Angeles, 1965. 252 p. 17 × 12 cm., il.

Libro de amo: Sekretaj sonetoj, La travestiita muzo, k.a. verkoj de P. kaj G. Peneter. 262 p. 20 × 12 cm., bind. Prezo: 4,60 us. dol. Liveras: F-ino Denise Bettman, 90 Faubourg St-Honoré, Paris 8e, Francujo (pĉk. 21 879 48 Paris).

Muzilo-kajero no. 2, de H. Paruzel. Eld. Muzilo. Nederlando, 1965. 40 p. 29 × 21 cm. 37 muzikpecoj. (Pri Muzilo vidu "Esperanto" 1964 okt. p. 171) 4,50 gld (18 st.)*

Freedom of Speech (Paroli libere). Eld. Brita E-Asocio, Londono, 1965. 35 p. 22 × 14 cm., il. Varba broŝuro anglalingva. 1 ŝil.

KOREKTO

La disko-kurson "Tra la mondo" eldonis ne Editions Nova, kiel ni erare indikis en la junia "Esperanto" (p. 109), sed Esperantaj Francaj Eldonoj. Krome ĝi konsistas ne el ok, sed el nur sep libretoj.

LA FLOROJ DE L' MALBONO

La libro-servo de UEA denove disponas pri malgranda kvanto de la 398-paĝa volumo "Floroj de l' malbono", versaĵoj de Charles Baudelaire elfrancigitaj de K. Kalocsay kaj aliaj. Prezo: 8,90 gld. (35,60 st.)

REKLAMOJ EN LA JARLIBRO 1966

Varbantoj kaj reklamantoj bonvolu noti, ke la ĝusta tarifo por la Jarlibro 1966 estas 100,— gld. por tutpaĝa anonco kaj proporcie por duonpaĝa aŭ kvaronpaĝa. Klišokostoj estas ekstre kalkulataj.

LAŬLANDE

Aŭstrujo

• S-ro Franz Jonas, la novelektita prezidanto de Aŭstrujo, mem parolas la Internacian Lingvon. (Vidu "Esperanto" majo p. 84).

Brazilo

• En Uberlândia la lernejo "Colégio Anchieta" enkondukis Esperanton devige en 4 gimnaziaj serioj ekde la nuna jaro. Ĝi estas ŝajne jam la tria lernejo en Brazilo, kiu instruas devige la Internacian Lingvon.

Britujo

• Novan lernolibron por anglalingvanoj: "Esperanto: a New Approach" verkis William Auld, la antaŭa redaktoro de "Esperanto" kaj "Monda Kulturo". Ĝi celas instrui la lingvon laŭ ĝia propra strukturo, anstataŭ laŭ tiu de la angla lingvo. Eldonos Heroldo.

Bulgarujo

• Je 24 aprilo amike renkontiĝis klubanoj el Sofio kaj Ateno. Parolis, nome de la bulgaroj kaj grekoj respektive, s-ro Nikola Aleksiev kaj s-ino Manusu Stamatiadis. Post interŝanĝo de donacoj okazis belarta programo kun grekaj kaj bulgaraj kantoj kaj dancoj.

Francujo

• Laŭ ilustrita artikolo en la organo de la franca rotaria movado, lastatempa enketo inter rotariaj kluboj montris grandan plimulton de simpatiantoj de Esperanto. Inter la negativaj respondoj, unu klubo asertis, ke Esperanto estas lingvo sole nur kultura kaj filozofia, dum alia pretekstis, ke ĝi estas artefarita lingvo sen tradicioj kaj literaturo !

Germanujo

• La 2-an de junio okazis en la Sarlanda Radio tuthora programo por gejunuloj pri la Internacia Lingvo. Partoprenis i.a. la ĝenerala sekretario de UEA, kaj telefone diskutis diversaj aŭskultantoj.

• Kiel kontribuon al la Jaro de Internacia Kunlaboro, la lerneja komisiono de TEJO aranĝis prelegvojaĝon de s-ro Ibrahim Tambura el Malio. Entute okazis 29 prelegoj, ĉefe pri "Afriko en la ritmo de la tempoj".

Hispanujo

• E-grupo en Valladolid (adreso: Ruiz Hernández 12) eldonis hispanlingvan informilon pri Eo, uzeblan ankaŭ aliloke. Prezo: po 4 resp. kup. por 100 ekz. (35 pesetoj).

Irlando

• En la universitato de Dublin la studentaj societoj pri modernaj lingvoj kuninvitis preleganton pri Esperanto. Ĉeestis 50.

Italujo

• En Casalecchio di Reno la urbestro inaŭguris la 11-an de aprilo la straton "Esperanto". Tiel altiĝas ĝis 246 (en 23 landoj) la nombro de stratoj aŭ placoj nomitaj laŭ la Internacia Lingvo aŭ ĝia aŭtoro.

Japanujo

• En oratora konkurso de la 39-a E-Kongreso de distrikto Kjuŝu (Hakata, 10-11 aprilo) la unuan premion gajnis f-ino Y. Uchida (foto). La urbestro de Hakata donis premian ŝildon, dum d-ro Ueda, konata pioniro, donacis pokalon.

Koreujo

• S-ino Doris M. Worcester, konata pro siaj vojaĝoj tra ĉiuj kontinentoj por prelegi pri Esperanto, forveturis la 13-an de majo de Japanujo al Koreujo por tie prelegi en universitatoj kaj gvidi kursojn.

Kubo

• La 2-an de majo 1965 fondiĝis landa asocio sub la titolo Kuba Esperanto-Komitato (Apartado 570, Camaguey). Jam en la urboj Florida, Ciego de Avila, Cárdenas, Victoria de las Tunas kaj Santa Clara, krom Camagüey, funkcias lokaj E-rondoj.

Pollando

• De 2 ĝis 15 oktobro 1965 Pola E-Asocio kaj Polaj Sindikatoj okazigos internaciajn feriojn en montara ripozejo Miedzygorze (Sudetymontaro). Kotizo inkluziva: 35 dolaroj usonaj. Detale informas: PEA Okcidenta Regiono, Turisma Fako, Wrocław, Dubois 3.

LAŬFAKE

Filatelo

• Laŭ listo de la februara eldono de "La verda lupeo", organo de E-Ligo Filatelista, ekzistas nun entute 48 Esperanto-poŝtmarkoj inkluzive de variaĵoj. La sama eldono listigas ankaŭ p.m. eldonitajn honore al apogintoj aŭ parolintoj de Esperanto. Informas: la Delegito en Oberkirch, Germanujo.

Kino

• La itala aŭto-firmo FIAT ĵus eldonis kolorfilmon pri sia nova modelo 850, kun parolo en Esperanto. Organizaĵoj, mendante ĝin ĉe Direzione Stampa e Propaganda, FIAT, Corso Marconi 10, Torino, Italujo, indiku la bezonatan grandecon (8, 16 aŭ 35 mm).

Literaturo

• La nova originala novelaro de Sandor Bako "Tiaj ni estas" samtempe aperis en la sama eldonejo — AL-BA, Los Angeles — en angla traduko de la aŭtoro.

• Okaze de la 60-a datreveno de la Unua Universala Kongreso (Boulogne sur Mer, 1905) ekaperos en Francujo serio da broŝuroj "Zamenhof en sia tempo".

Pacmovado

• "Militrezisto", organo de la Internacio de Militrezistantoj, ekaperis ankaŭ en esperanta eldono, bone multobligita. Ĝi aperos kvaronjare kaj kostas 10 ŝil. (20 stelojn) jare. Adreso: Lansbury House, 88 Park Avenue, Enfield, Mddx, Britujo.

• "Neperforto" nomiĝas nova esperanta gazeto, kiu informas pri klopodoj "fronti la konfliktojn kaj malpacojn per sinteno neperforta". Dumonata, tute en Esperanto, bone multobligita. Jarabono 20 steloj.

Feliĉa oratorino (Vidu Japanujo)



LA JUNA VIVO

Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando.

GRAVA HELPO POR TEJO

Post la grandanima donaco de 300 gld. de s-ino E. Burgler-Jezsö (longjara gvidintino de TEJO) nun venis nova, tuja respondo al la "Alvoko" en LJV-majo. TEJO ricevis anoniman donacon de 500 gld. memore al Kerrin Masterman, membro de JEB, kiu mortis en aŭtomobila akcidento la 5-an de majo 1962. Jen du pruvoj, kian lokon TEJO okupas en la koroj de pluraj Esperantistoj. Ĝi estas danka kaj fiera pri tio.

☆

Dancoj, kantoj, komedietoj de lernantinoj ilustris tutregionan kunvenon de Méricourt/Lens, la 28-an de marto. Organiza komitato: Esperanto, 83 Cité des Carisiers, Méricourt/Lens (PdC), Francujo.



Supre: En la nomo de Tut-Japana Altlerneja E-Ligo, gelernantoj havis sian ĝeneralan kunsidon la 31-an de januaro 1965, en Ikuno-Altlernejo, Osaka.

Maldekstre: Suno, neĝo, Esperanto. Jen la tri ĉefaj eroj de la ferio-semajno en Bohinj (Jugoslavio) februaro 1965.

Sube: Kernaj membroj de Korea E-Junularo, kiuj preparis tre sukcesan ekspozicion.

POLLANDO.

En Karpacz okazis la Internacia Esp. Vintra Tendaro, kiun organizis STELO kun helpo de PEJ. Kelkaj partoprenintoj venis al Komerca Faklernejo en Jelenia Góra por renkontiĝo kun lernantinoj, kiuj programe lernas Esperanton en 6 klasoj po 40. La vizito estis la unua ebleco por ili kontroli sian lingvoscion en konversacio kun eksterlandanoj. La foto montras hungarinon, bulgaron, kaj lernantinojn.



HISPANUJO.

La Junulara Esp. Klubo en Valencia celebris la 105-an naskiĝdaton de Zamenhof per granda prezentado. Oni ludis du komikajn verkojn en la hispana lingvo kaj unu ("Ridetu, bonvolu") en Esperanto. Post tio orkestreto amuzis la publikon per moderna muziko. La prezidantino de la Klubo, Amparo Asensi, surmetis al ili rubandon kun la stelo. Ĉeestis la feston membroj de la jusfondita Jun. Rondo de Cheste.



ESPERANTO EN RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo. En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Por aliaj horsistemoj vidu la jarlibron 1965, 1-a parto, p. 190-191. Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Ĉiutage	15.30-16.00	Warszawa, 200m. (1502 kcs), 50.42m. (5950 kcs), 50.04m. (5995 kcs), 48.90m. (6135 kcs), 42.11m. (7125 kcs), 41.99m. (7145 kcs), 41.27m. (7270 kcs), 41.18m. (7285 kcs). P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.
Dimanĉo	11.00-11.30	Pekino, 40.8m. (7350 kcs), 24.9m. (12055 kcs). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.
	12.30-13.00	Pekino, 25.1m. (11945 kcs), 19.9m. (15080 kcs). I.
	16.35-16.50	Roma, 31.33m. (9575 kcs), 25.20m. (11905 kcs). P. Radio Roma, Esperanto fako, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	19.00-19.25	Sofia, 48.62m. (6170 kcs), 39.11m. (7670 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	23.30-23.55	Sofia, 48.62m. (6170 kcs), 41.35m. (7255 kcs). P.
Lundo	00.15-00.45	Muritiba, 216m. (1390 kcs), I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo..
	6.15- 6.30	Gdansk, 230m. (1304 kcs), I. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdansk,
	22.40-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746kcs). P., N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
	22.45-23.00	Valencia, 278m. (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
Mardo	14.45-15.00	Valladolid, 203m. (1475 kcs), K.I. Radio Valladolid, Hispanujo.
	16.50-17.00	Wien, 577m. (520 kcs). 514m. (584 kcs). 293m. (1025 kcs). 25.45m. (11785 kcs), 16.78m. (17880 kcs). P. Radio Wien Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Merkredo	17.45-18.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 50.08m. (5990 kcs), 30.71m. (9770 kcs), 25.10m. (11.950 kcs), 16.78m. (17.880 kcs). K. I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.
	18.45-19.00	Resende, 196m. (1530 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Brazilo.
	23.30-23.55	Bilbao, 264 m. (1133 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Bilbao, Hispanujo.
Jaŭdo	8.30- 8.40	Wellington, 49.34m. (6080 kcs), 31.45m. (9540 kcs). I. Radio New Zealand, P.O. Box 2396, Wellington C.1, Nov-Zelando. (nur la lastan jaŭdon de ĉiu monato).
	11.30-11.40	Wellington. Ripeto de la programo.
	17.50-18.00	Praha, 233m. (1286 kcs). I. Radio Praha, Disaŭdigoj por Aŭstrujo, Praha, Ĉeĥoslovakujo (nur la lastan jaŭdon de la monato).
	20.30-20.45	Volta Redonda, 192m. (1560 kcs). P. Radio Siderurgica Nacional ZYP 26, Volta Redonda (Rio de Janeiro), Brazilo.
	23.05-23.20	Zagreb, 264m. (1133 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.05-23.20	Beograd, 439m. (683 kcs), 48.78m. (6150 kcs). P. (programo de Radio Zagreb).
Vendredo	20.00-20.30	Pekino, 51.00m. (5880 kcs), 40.40m. (7440 kcs), 30.10m. (9955 kcs). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.
	22.45-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746 kcs), P., V.A.R.A., Poŝtkesto 175, Hilversum, Nederlando.
Sabato	9.45-10.00	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs), 31.53m. (9515 kcs). K. Radio Roquete Pinto Av. Almirante Barosso 81, Rio de Janeiro, Brazilo.
	11.00-11.30	Pekino, kiel dimanĉe.
	11.30-12.00	Niteroi, 240m. (1250 kcs), I.K. Radiodifusora Fluminense, Niteroi (Rio de Janeiro), Brazilo.
	12.30-13.00	Pekino, kiel dimanĉe.
	16.00-16.30	Guatemala, 220m. (1360 kcs), 48.54m. (6180 kcs). I.K. La Voz de Guatemala Guatemala Cd., Mezameriko.
	19.00-19.15	Teresina, 259m. (1160 kcs), 62.56m. (4795 kcs). P. Radio Pioneira de Teresina, Rua Teodoro Pacheco 1179, Teresina, (Piauí). Brazilo.
	20.00-20.30	Pekino. Kiel vendrede.
	22.00-22.30	Uberlândia 191m. (1570 kcs), I.K. Rádio Cultura de Uberlândia, Minas Gerais, Brazilo.

NOV-ZELANDA RADIO, kiel kontribuo por la Jaro de Internacia Kunlaboro, komencis disaŭdigi dekminutan programon la lastan jaŭdon de ĉiu monato. Raportoj pri ricevo kaj komentoj pri la programoj estos alte taksataj. Ĉar la esperantlingva disaŭdigo estas eksperimenta, ĝia daŭrado dependas de la ricevotaj leteroj. Aŭskultu kaj respondu !

DELEGITOJ

Argentino

Rosario JD: S-ro Rubén Feldman Gonzalez, studento med., Richeri 860; tel. 393078.
FD (Medicino): la JD.

Aŭstralio

Albany (W.A.) 12.000.
FD (Instruado): S-ino E. E. Dougan, instruistino, 31 Flinders Parade; tel. 474.

Belgujo

Brussel-Bruxelles D: vakas.

Brazilo

Guaratinguetá (São Paulo) 60.000.
D: S-ro Ivon Barbosa, militisto, Rua Pedro Cápio 582; tel. 2249.
Recife D: la FD (Geologio)
VD: la FD (Komerco)
FD (Edukado): S-ro Olavo Coimbra, katolika pastro, Rua Dom Bosco 551; tel. 2-3564.
FD (Religio: katolikismo): la FD (Edukado)

Britujo

Harlow FD (SOS-aŭto-servo): la D.
Macclesfield (Cheshire) 37 400.
D: S-ro E. S. Barker, teksisto, 41 Robin Lane, Lyme Green.

Ĉeĥoslovakio

Frýdek Místek D: S-ino M. Bartovská, ripariistino en teksejo, Bruzovská 330.

Finnlando

Hartola D & FD (Instruado): vakas.
Taivalkoski D: vakas.

Francujo

Mézières FD (Fervojoj): S-ro Serge Debar, fervojisto, 8 rue Emile Beaucourt.
Montpellier FD (Junulgastejoj): la FD (Med.)
Nice D: S-ino G. Coleau, kontistino, 50 Bd de la Madeleine; tel. 86.66.16.

Germanujo

757 **Baden-Baden** (Baden) 50.000.
JD: F-ino I. Böhringer, stenotajpistino, Felsenweg 5; tel. 74714.
Bamberg VD: S-ro Josef Merz, dungito en notariejo, 86 Bamberg, Unt. Sandstr. 4.
FD (Komerco): S-ro Georg Reh, komercisto kaj librobindisto, 86 Bamberg, Unt. Sandstr. 4; tel. 22091.
Irschenberg D: S-ino E. Mertin, kontoristino, 8161 Irschenberg, Autobahn-Rasthaus.
Mainz FD (Religio: Ev. Kr.): vakas.

Hispanujo

Barcelona FD (Konstruado): vakas.

Hungarujo

Budapest FD (Tekniko): S-ro Sándor Szathmári, maŝininĝeniero, verkisto, Budapest V., Gerlóczy utca 1, III. 1.

Jugoslavio

Skopje FD (Fiziologio): D-rino A. Volkanoska, docento, ul. 338, Bl. IV, st. 18.

Maroko

Kenitra D: vakas.

Nederlando

Sevenum (Limburg) 6000.
D: S-ro L. de Lang Evertsen, Huize Sevenheijm en Sevenum; tel. 0-4767-761.

Nov-Zelando

Seacliff D & FD (Hort.): vakas.

Pollando

Białystok D: S-ro L. Kłodecki, instruisto, Rynek Kościuszki 13 m 9; tel. 26-27.

Svedujo

Norrköping FD (SOS-aŭto-servo): S-ro Charles F. Johansson, aŭtoriparisto, Torpvägen 12; tel. 011-131328; 011-111077 (laborejo).
Sandarne (Hälsingland) 4000.
FD (Pedagogio): S-ro Runo Stridell, instruisto, PL 2806; tel. 0270-60294.
Stockholm FD (SOS-aŭto-servo): S-ro Artur Malmkvist, aŭtisto, Åsögatan 182, V, Stockholm Sö; tel. 41 78 74.
Uppsala FD (Industrio): S-ro Eugen Rytenberg, teksinĝeniero, V. Järnvägsgatan 7; tel. 14 03 22.

Usono

College Park (Maryland) 20.000.
D: S-ro Robert L. Davis, ĵurnalisto, 9608 48th Place, College Park, Md. 20741; tel. 935-5341.
Detroit (Michigan) 3.942.000.
D: S-ro L. Shelton Allen, kristana misiisto, c/o Far Eastern Gospel Crusade, 14625 Greenfield Road, Detroit, Michigan 48227; tel. 273-6460.
FD (Religio: Pr.): la D.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Merz, s-ro Josef, Bamberg, Germanujo.
Schmidt, inĝ. G., Berlin, Germanujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1964

357. Ballard, s-ro Bernard C., Usono.
358. Ballard, d-ro Francis E., Usono.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1965

305. Kosutek, s-ro J., Aŭstralio; 306. Dalier, s-ro H.; 307. Sahatdjian, s-ro Ara, Francujo; 308. Bettges, s-ro Johann; 309. Epstein, s-ro Felix; 310. Fritsch, d-ro E.; 311. Jacobsthal, s-ro A.; 312. Kraft, s-ro T.; 313. Markuse, s-ro W.; 314. Reinelt, d-ro J.; 315. Sandrock, s-ro O.; 316. Klünder, s-ro Willi; 317. Schmidt, s-ro Alfred; 318. Schumacher, s-ro F.; 319. Schumacher, f-ino M.; 320. Wolff, s-ro J.; 321. Wingen, s-ro Wilhelm; 322. Wuenschel, s-ro H. Ph., Germanujo; 323. Diez Sanz de Andino, s-ro S.; 324. Perez Carbonié, s-ro A., Hispanujo; 325. Canovski, s-ro B.; 326. Galeski, s-ro M., Jugoslavio; 327. Coppens-Bink, s-ino A. B. M., Nederlando; 328. Asplund, f-ino Nannie; 329. Enström, f-ino M. L.; 330. Ericson, s-ro Å.; 331. Hakansson, s-ro Hugo; 332. Hedlund, s-ino Ingrid; 333. Hertzman, s-ro A.; 334. Johansson, f-ino Ethel; 335. Leijder, s-ro Hj. Alderin; 336. Linder, s-ro Karl H.; 337. Lundin, inĝ. Henry; 338. Näslund, f-ino E.; 339. Nordström, s-ino G.; 340. Rytenberg, inĝ. E.; 341. Stenström, f-ino S., Svedujo; 342. Ballard, s-ro Bernard C.; 343. Ballard, d-ro Francis E., Usono.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO)

Williams, s-ro Norman, Britujo: 2,20 gld.
Künzel, d-ro H., Germanujo: 5,40 gld.

Sumo entute ricevita:	16.491,04 gld.
Sumo elspezita:	15.952,68 gld.
Saldo pozitiva:	538,36 gld.

DONACOJ AL ĜENERALA KASO (Gld.)

Beutke, s-ino M. 5,40; Brückner, s-ro Max, 5,40; Jocham, s-ro Gebh. 0,90; Link, s-ro Karl, 4,25; Schumacher, s-ro F. 12,60, Germanujo; Möllestad, s-ro Sven, 17,36, Svedujo; Reich, s-ro W. 18,—, Usono.

FONDAĴO CANUTO

Bettges, s-ro Joh., Germanujo: 1 MJ.
Wilke, s-ro Harry, Germanujo: 1 MA.
Reich, s-ro W., Usono: 1 MA.
Dresselhaus, s-ro H., Germanujo: 3 MA, 1 J-MJ.
Ekde tiu ĉi jaro la Fondaĵo estas uzata ĉefe por pagi kotizojn de sindonaj novaj esperantistoj en Azio kaj Afriko.

DONACO POR TEJO

"Memore al Kerrin Masterman (1939-62)": 503 gld.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO

Moerbeek, s-ro R., Nederlando.

DONACOJ POR INTERNACIA ARTA TEATRO

Künzel, d-ro H., Germanujo: 5,40 gld.
Haas, s-ino Priska, Jugoslavio: 24,— gld.
Reich, s-ro W., Usono: 18,— gld.

DONACO POR OFICEJA ILARO

Künzel, d-ro H., Germanujo: 5,40 gld.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO

Reich, s-ro W., Usono: 18,— gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Oni ne trovis absolutan limon de la homa komprenkapablo. Tial ni povas kalkuli, ke estas eble malkovri la bazajn strukturojn de la vivo. Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto. Mariendalsvej 94-96. Kopenhago F., Danlando.

El ĥaosa influo de niaj naciaj lingvoj liberigu vin per "Raciaj Derivo kaj Verbuzo" de Emilo Gasse. st. 2.20 + afranko. Ĉe UEA kaj ceteraj libroservoj.

Peter Laufen atentigas pri rea adresŝanĝo: 5743 Hutchison, Montrealo 8. Kebekio. Kanado.

Deziras korespondi kun esperantistoj en Germanujo, Italujo kaj aliaj landoj: S-ino Ilonka Pakai, Đorđe Stratimiroviča 5, Zrenjanin, Banat, Jugoslavio.

22-jara junulo dez. kor. kun geamikoj el la tuta mondo. Respondo garantiata. Adolf Pirtovšek, Skorno št.17 p.Šoštanj. Jugoslavio.

Deziras korespondi kun ges-anoj el tutmondo. precipe kun partoprenontoj de la Budapesta kongreso 1966. Skribu al s-ino Ingrid Johansson, Hasslumsvägen 6062, Skövde. Svedujo.

Geonkloj Esperantistaj estas plenkreskuloj kiuj korespondas en Esperanto kun infanoj. Detalojn: Sullivan, 3 Berwick Avenue, Urmston, Manchester, Britujo.

Neĥatolikoj povas senpage ricevi la dumonatan revuon "Vojo Vero Vivo" kun informoj pri la katolika religio. Skribu klare viajn nomon kaj adreson al la Sekretariejo de la "Internacia Katolika Informejo", Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Miĥail Lermontov, la granda majstro de la rusa prozo, UEA eldonis ĉi tiujn elstarajn rakontojn en la traduko de D. Staritsky.

Kun bibliografio
de Lermontovaj
verkoj
en Esperanto

Moderna plasta
kovrilo

Prezo: 5,– gld.
(20 steloj)



Per plumo samtempe ekscita, kortuŝa, ironia kaj senspirige poezia, la aŭtoro vojaĝigas nin kun juna rusa oficiro, laca pri la vivo kaj kroĉiĝanta al la iluzia feliĉo de fortaj sensajoj.

Serio ORIENTO-OKCIDENTO n-ro 4

KALEVALA

la granda nacia eposo de la finnoj
verse tradukis J. E. Leppäkoski

368 paĝoj kun postprezento, lingvaj kaj ilustritaj etnografiaj klarigoj. Pli ol 100 vinjetoj kaj 1000 ornamaj komencliteroj de la fama finna artisto Axel Gallen-Kallela. Formato de "Naŭzo", "Malsata ŝtono" kaj "Rakontoj de Oogai".

Prezoj:
kun leda dorso 35,— gld (140 st)
tuttole bind. 25,— gld (100 st)

Sola vendrajto ekster Skandinavio: UEA

ESPERANTAJ - FRANCAJ - ELDONOJ

MARMANDE - Francujo

Doktoro L. L. Zamenhof

	broŝ.	bind.
FUNDAMENTO de ESPERANTO (5-lingva - 355 paĝoj)	38 st.	50,4 st.
LINGVAJ RESPONDOJ 130 p.	23 st.	31,4 st.
HAMLETO bind. ilust. 206 p.		40 st.

J. P. Sartre

	broŝ
SEN ELIRO - LA RESPEKTEMA P . . . 111 p. (en traduko de Roger Bernard)	24,5 st.

Serio da DEK infanlibroj, kolorilustr. 28,5 st.

Jean Bacquer

LA KUNPRINCLANDO ANDORO
73 p. 60 fotoj 23 st.

MENDU ĉe EDITIONS FRANÇAISES d'ESPERANTO
11 rue Paul Vergne - MARMANDE - Francujo
Poŝtĉekkonto: 30-900 Bordeaux
(ĉiuj prezoj afrankitaj)

Eldono de KOSMO Traduko de T. Nakamura

Okakura kakuzo

LA LIBRO DE TEO

Studolibro pri orientaj ideoj kaj idealoj

142 p. $ 2,50
luksa 9.— gld.
prezento 36 st.

"Kiam venis Enciklopedieto Japana, mi estis konvinkita, ke tiu libro estas apenaŭ superebla. Sed jen La Libro de Teo ĝin superatutis!"

Juan Régulo-Pérez

Sola vendrajto ekster Japanujo: UEA

MARTINUS-INSTITUTO

Vivkoncepto kaj scienco

Pensoj kaj sentoj vere packonstruaj

En la Universala Kongreso en Tokio vi povos aŭskulti tiujn du prelegojn de inĝeniero Ib Schleicher

UZU LA JIK-GLUMARKOJN

Prezo: 0,40 gld.
(1rpk.) por unu
folio (10 markoj)

KAJ

VARBU

SUBSKRIBOJN !

NOTU BONE !

Pro la okazo de la Universala Kongreso en Tokio escepte aperas nun aparta **julia** eldono de "Esperanto". Sekvos eldonoj **aŭgusta** (presota fine de julio) kaj kombinita **septembra-oktobra** (presota komence de septembro), en kiu aperos la raportoj pri la 50-a U.K. kaj la 21-a IJK.

Surprizo

"SURPRIZO" — ripozdomo
organizita de Pola Esperanto-Asocio kun PBP "Orbis" en Bukowina Tatrzánska (Tatry-montaro) 16 km de Zakopane

komencas sian sezonon la 20-an de aŭgusto 1965.

Plena restado por unu persono — 12 tagoj — kostas nur 47 us $ kaj inkluzivas:

- loĝadon en dupersona ĉambro
- tri manĝojn tage
- esperantajn lingvajn ekzercojn dum 10 tagoj (po du horoj tage)
- du Esperant-temajn prelegojn
- tuttagan zorgadon fare de persono parolanta Esperanton kaj almenaŭ unu okcident-eŭropan lingvon

Prezo por la sama, 12-taga restado, por personoj kun propraj tendoj (sen loĝado en pensiono) estas reduktita ĝis 38 us. $

Krom la supre cititaj servoj, estos organizataj ekskursoj al la montaro kaj al Krakovo, pagotaj aparte:

1. Al Koscieliska-valo (per aŭtoĉaro) — us $ 1,—
2. Al Kasprowy-pinto (aŭtoĉaro, ŝnurvagono) us $ 1,50
3. Flosado tra Dunajec (aŭtoĉaro, flosoj) us $ 3,—
4. Al Krakovo (aŭtoĉaro, vizitado de la urbo) us $ 5,—

ORBIS

Plilongigo de la restado estas ebla.
Ĉiujn mendojn por Esperanto-pensiono "SURPRIZO" akceptas: PBP "ORBIS", Sekcja Imprez Specjalnych, Bracka, 16 Warszawa, Pollando.

Por mi la nomo signifas Kvalito !

MI DIKTAS MIAJN RAPORTOJN SURLOKE
kun la faktoj ankoraŭ tute freŝaj en memoro. Kopiado okazas poste. Mia tajpistino diras ke ŝi tre alte ŝatas la diktilon de Philips pro ĝia sonklareco kaj facila manipulo.



KIAM MI ESTIS JUNA
ni havis hejme radioaparaton de Philips. Miaj gepatroj ankoraŭ posedas ĝin kaj eĉ hodiaŭ ĝi bone funkcias. Tial mi tre atentis, kiam antaŭ kelkaj tagoj mi aĉetis mian propran radion, ke ĝi portu la emblemon de Philips!

LA SCIVOLEMON DE VIZITANTOJ
ĉiam tiklas tiuj misteraj figuroj, blanke robumitaj kaj kapuĉitaj, laborantaj malantaŭ vitroj sub timtremiga, blueca lumo. Tiun lumon elradias bakteri-mortigaj, ultraviolaj lampoj, nemalhaveblaj ĉe laboro tiel vivdecida kiel la produktado de antibiotikoj. Tiuj lampoj, samkiel sennombraj aliaj por uzo en domo kaj uzino, estas produktoj de Philips.

fido al **PHILIPS** estas tutmonda

Okupante preskaŭ 250.000 kunlaborantojn, Philips estas unu el la plej grandaj elektronaj industrioj de la mondo. Propraj naciaj organizoj en 55 landoj, agentoj en 115 merkatoj.

LUMO, SONO, RADIO, TELEVIDO, MASTRUMAJ APARATOJ, GRAMOFONDISKOJ, TELEKOMUNIKADO, KEMIAJ KAJ FARMACIAJ PRODUKTAĴOJ, MEDICINAJ, INDUSTRIAJ KAJ SCIENCAJ APARATOJ KAJ ELEKTRONAJ KONSTRUPARTOJ.